REGo

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU *№ 3 (40) junio 2007*




en la numero *impresoj kaj raportoj pri EsPrimo-4*
Internacia konferenco pri propedeŭtika rolo de Esperanto
kial UK en 2009 ne okazos en Rusio
akademia konsultejo
tabelo de BET-oj
“La Mastro de l’ Ringoj” reaperos
ĉapitro el nova romano de Mikaelo Bronŝtejn
“Kavkazskaja plennica” kaj “Robinsono Kruso” eksonis en Esperanto
“Bulteno de REU”, novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2007

enhavo:

01 RET-07 proksimas
02 Trejnseminario "Flugiloj..." en RET
02 Sukcena Ondo
03 Internacia konferenco en Rusia Akademio
04 Rezolucio de la Konferenco
05 Ĉu legi aŭ ne legi?
07 Statistiko de EsPrimo-4
07 Primavera festo en Tjumenj
09 Seminario por instruemaj esperantistoj
10 Interlingvistika prelego en Ĉeljabinsk
11 Jubileo de Natalia Rajskaja
12 Kial UK en 2009 ne okazos en Rusio
13 Kunsido de la Estraro de UEA
14 Germana E-Kongreso kunvenis en Hamburgo
15 Novaj REU-membroj por 2007
15 Kotizoj de REU por 2007
16 Printempaj novaĵoj
16 Invito al Jalta
17 Esperanto-tendumado en Hispanio
17 Nova vizaĝo de Itala Kongreso
18 La 6-a Novjara Renkontiĝo
19 Prezidanto de Kroatio sendis florbukedon al Zamenhof-strato
19 Naŭ IKU-prelegoj, tri AIS-kursoj en Jokohamo
20 Esperanto en "Bildarchiv Austria"
21 Sukcesa konferenco en Litovio
22 10-a Internacia Fotokonkurso
23 Pri historio de BET-oj
24 Tabelo de BET-oj
25 Akademia Konsultejo
28 "La Mastro de l' Ringoj" reaperos
28 Jubilea ekspozicio pri Samarkando
29 Literatura konkurso "Liro-2007"
29 Aperis granda Germana-Esperanto vortaro
30 Versaĵo de K.Simonov
32 Ĉapitro el nova romano de Mikaelo Bronŝtejn
40 Amuzaj mistradukoj de komencantoj
18, 21, 28, 30 Anekdotoj
k3 Nova klubo en Jekaterinburg
k3 Du novaj esperantistinoj en Moskvo
k4 "Kavkazskaja plennica" kaj "Robinsono Kruso" eksonis en Esperanto
k4 Pardonpeto



fama lernolibro de Boris Kolker, pere de kiu lernis la lingvon granda parto de sovetiaj kaj rusiaj esp-istoj, reaperis ĉe la eldonejo "Impeto"

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 3 (40) junio 2007

aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2007:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 200 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 20 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*

En Jekaterinburg naskiĝis nova klubo...



La 3-an de junio uralaj esperantistoj el Jekaterinburg, Ĉeljabinsk kaj Kogalim renkontiĝis en la Domo de Paco kaj Amikeco en Jekaterinburg por festi naskiĝon de nova Esperanto-klubo "Arĝenta Flamo" kaj komencon de somero. La "Sorĉan someran vesperon kun amikoj" organizis la klubanoj, ili jam estas 9 homoj. La programo abundis per skeĉoj, kantoj, deklamadoj de versoj pri somero kaj amo. Ĉiuj ĉeestantoj distre kaj amuze kunaktivis. La gastoj donacis al la klubo kelkajn lernolibrojn kaj vortaron, deziris sukcesojn kaj energion. Fine de la vespero por ĉiuj estis organizita bankedo. ***(Aleksandr Osincev)***

... kaj en Moskvo – du novaj esperantistinoj

La 10-an de majo ĉe la konata esperantista paro Liana Luĥvatullina kaj Gennadij Ŝilo aperis filino Sofia, kiun la feliĉaj gepatroj jam konsideras esperantistino.

La 23-an de majo en la familio de fama Ebardo Mikaelo Povorin kaj esperantistino Jelena Povorina naskiĝis filino Ksenija. En la apuda foto vi povas vidi la feliĉan patron Mikaelon Povorin kun Ksenija kaj la filo Vlaĉjo, kiu estas denaska esperantisto.

(esperanto-rus-informoj)





"Kavkazskaja plennica" kaj "Robinsono Kruso" eksonis en Esperanto

Estas finfarita esperantigo de la filmo "Kavkazskaja plennica, ili novije prikljuĉenija Ŝurika" – en mia E-a traduko ĝi nun nomiĝas "Ŝtelado de fianĉino, aŭ Kaŭkaziaj aventuroj de Ŝurik". La filmo mem estis preta jam antaŭe, ĝis nun en liberaj momentoj mi okupiĝis pri polurado kaj la ekstera aspekto. La DVD enhavas tri sonvojetojn: en Esperanto – dukanala sono, E-o – seskanala sono, la originala – seskanala. Estas aldonitaj E-aj subtitoloj. La E-a voĉa traduko estas sinkrona (la originalaj dialogoj aŭdeblas, sed estas mallaŭtigitaj), plenumitaj per du voĉoj (mi sonigis ĉiujn virajn, mia edzino Nataŝa – ĉiujn inajn). Estas faritaj ankaŭ dinamikaj menuoj kaj bela grafika aspekto (disko kaj la skatolkovrilo). La kosto en Rusio estas 120 rub., triona rabato ekde 3 ekz. Sendokostoj: 25 rub., por ĉiu plia ekzemplero + 5 rub.

Estas finfarita kaj mendebla ankaŭ nova sonlibro, registrita en la formato MP3. Ĉi-foje tio estas "Robinsono Kruso". Temas tamen ne pri la originala teksto, sed pri ne malpli fama instrucela rerakonto, esperantigita de H.J.Bulthuis en la 1920-aj. La registraĵoj estas plenumitaj en la stilo de radiospektaklo, do, kun akompanaj sonoj, kiam tio necesas, kiel ekz. pafoj, marplaŭdoj, fulmotondroj ks. Krom la sonoj la KD enhavas ankaŭ la tekstajn versiojn de la romano, en diversaj formatoj. Estas aldonitaj ankaŭ kelkaj elektronikaj vortaroj. La disko havas koloran kovrilon, HTML-menuon. Voĉlegis la tekstojn kaj preparis la diskon Andrej Grigorjevskij. La prezo por rusianoj estas 50 rub., sendokostoj – 25 rub.

La mendojn oni sendu al la adreso: Андрей Анатольевич Григорьевский, ул. Ленина 40 – 14, Шумерля, 429120.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

Pardonpeto. *En la antaŭa numero de REGo (2(39), 2007) sur la kvara kovrilpaĝo omaĝe al la 15-jariĝo de la eldonejo "Impeto" aperis foto kun la eldonitaj de "Impeto" libroj. Bedaŭrinde, pro mia kulpo, inter tiuj libroj troviĝas unu libro, eldonita de la Universitato Justo. Pardonpetojn al ambaŭ eldonejoj kaj al la legantoj.* ***(G.Kokolija)***

RET-07 PROKSIMAS

Jam post 2 monatoj komenciĝos RET-07 – la plej amasa rusia E-aranĝo dum kelkaj lastaj jaroj. Al Rusiaj E-Tagoj jam aliĝis pli ol 220 personoj, ĉirkaŭ duono el ili partoprenos ne nur en RET mem (18-25.08), sed ankaŭ en la paroliga periodo, kiu pasos de la 15-a ĝis la 18-a de aŭgusto.

Baldaŭ ĉiuj aliĝintoj ricevos la duan Informleteron pri la aranĝo, kie estos detalaj klarigoj pri manieroj atingi la bazejon, statistiko de la aliĝoj, provizora programo k.s. Ĉiuj tiuj informoj troveblos ankaŭ en la ttt-ejo de la aranĝo <www.stelaro.ru>. Ĉi-sube vi povas konatiĝi kun kurta priskribo de la vojo kaj listo de ĉefaj programeroj de RET-07.

La urbon Primorsko-Aĥtarsk eblas atingi buse el Krasnodar (150 km), Timaŝevsk (85 km) aŭ Kanevskaja (80 km) (tiuj ĉi tri lokoj atingeblas trajne, Krasnodar – ankaŭ aviadile). Plej oportune estas veturi de Timaŝevsk, ĉar busoj de tie pli oftas. Petveture atingi Primorsko-Aĥtarsk-on de tiuj ĉi stacioj estas malfacile. Do, necesas atingi la busstacion en Primorsko-Aĥtarsk. Poste necesos veturi ankoraŭ proksimume 5 km ĝis la ripozbazejo "Lotos": aŭ per taksio kontraŭ 60 rub. aŭ per bus(et)o, kiu estos speciale mendita por la partoprenontoj. Krome, la organizantoj klopodos mendi specialajn busojn al la bazejo de Timaŝevsk (eble ankaŭ de Kanevskaja). Tamen ties kvanto kaj horaro klariĝos nur antaŭ la tendaro.

Certe estos E-indikiloj en Primorsko-Aĥtarsk, Timaŝevsk, Kanevskaja kaj Krasnodar. Ekde mezo de julio pri ĉiuj surlokaj demandoj eblas kontakti Gennadij Ĥmelj laŭ la telefonnumeroj +7-86143-23503 (hejma) kaj +7-918-9656163 (poŝa).

Jen estas kelkaj partoj de la nun kompilata programo de RET-07.

Matene: E-kursoj por komencantoj (aparte – por infanoj), Prelego-kurso por progresantoj, diskutrondoj, la seminario "Flugiloj de malfacila vento", prezentoj de libroj kaj eldonejoj, koruso, Piana Vojaĝo, ekskursoj.

Tage: gruplaboroj, kanto-instruado, kvizoj kaj konkursoj, sportaj ludoj, Foiro de interesoj, ĈALK-ekzamenoj, Interkluba konferenco, tradukista metiejo, rolludo, KGS, Somera Universitato, Neptunfesto.

Vespere: koncertoj (Mikaelo Povorin, Georgo Handzlik, JoMo, Pavel Korotenko, Pavel Moĵajev), Vespero memore al Sergej Bozin, benefico de Jefim Zajdman, Festa Balo.

Nokte: diskoteko, gufujo, lignofajro, videosalono.

Dum tuta tago estos okupoj por la infanoj (pentrado, modlado, gajaj konkursoj, ludoj, animaciaj filmoj). Iam ajn eblos viziti la bazejan plaĝon.

La maro, Esperanto-etoso kaj la geamikoj atendos vin aŭguste en Primorsko-Aĥtarsk!

Garik Kokolija (Moskvo)



TREJNSEMINARIO “FLUGILOJ ...” EN RET

La trejnseminario “Flugiloj de Malfacila Vento” (FMV) invitas ĉiujn junajn instuantojn kaj instruemulojn de Esperanto! La unuan fojon ĝi okazos en RET ĉe Azova maro, kiu pasos de la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto!

La trejnseminario (6 studunuoj po 2 horoj) konsistos el 2 temaj partoj: la metodika kaj la gramatika. La metodika parto enhavos la jenajn teoriajn temojn: instrumetodoj; bazaj principoj de instruado; planado de leciono; lerniloj. Dum la praktika parto bezonatos prezenti instruadon per lecion-fragmento. En la gramatika parto estos traktataj – teorie kaj praktike – malfacilaĵoj de la Esperanta gramatiko.

Por aliĝi al la trejnseminario necesas ĝis la 15-a de julio plenigi la Demandaron (vidu en la sube indikita ttt-ejo) kaj ĝis la 22-a de julio prepari la planon de la 15-minuta lecion-fragmento (vi ricevos rekomendojn pri kiel fari tiun).

Se dum la studado vi montros teoriajn sciojn pri iuj metodikaj temoj, sukcesos pri la gramatika kontrolo kaj prezentos lecion-fragmenton, vi ricevos la oficialan Ateston de ILEI pri la partopreno en la trejnseminario. La partopreno estas senpaga, sed vi estos petataj pagi ILEI-kotizon por la kuranta jaro.

Ĉe <http://vikio.ikso.net/projektoj/flugiloj?v=sar> estas haveblaj kurantaj informoj. Aŭ vi povas rekte demandi la organizantojn ĉe: <flugiloj@gmail.com>, <alex.osintsev@gmail.com>, <amico86@mail.ru>.

Bonvenon!

Aleksandr Osincev (Jekaterinburg)

SUKCENA ONDO

Kaliningrada Regiona Esperantista Unuiĝo (KREU) kaj la redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al la festa renkontiĝo “Sukcena Ondo 2007” (17–19.08.2007), dediĉita al la 100-jariĝo de la organizita Esperanto-movado en Kenigsberg-Kaliningrad.

La 17-an de aŭgusto (vendrede) okazos Festkunveno en la prestiĝa Germana-Rusa Domo. Krom esperantistoj la Festkunvenon partoprenos diplomatoj, reprezentantoj de urbaj kaj regionaj ŝtataj instancoj kaj sociaj organizaĵoj, ĵurnalistoj. Etan koncerton prezentos Natalia Striĵnjova. La Festkunvenon garnos gazetara konferenco, jubilea ekspozicio kaj bufeda regalo. Post la solenaĵoj sekvos interkona vespero.

La 18-an de aŭgusto (sabate) ni havos tuttagan ekskurson kaj piknikon en la unika naturparko Kurŝa Terlango. Post la reveno en la urbon, vespere, en restoracio okazos Centjariĝa Bankedo kun Jubilea Kuko.

La 19-an de aŭgusto (dimanĉe) en la Marista Kulturpalaco “La Ondo de Esperanto” kaj “Sezonoj” prezentos sin. La novan eldonon de “La Mastro de l’ Ringoj” de J.R.R.Tolkien (en la traduko de William Auld) oni povos aĉeti kun speciala jubilea rabato. Poste oni konatiĝos kun la rimarkindaĵoj de la urbo: la Katedralo, filozofo Kantio kaj Sukcena Muzeo.

Pliajn informojn legu en la novaĵrubriko de la retejo de Sezonoj/La Ondo <http://www.esperanto.org/ondo>.

(esperanto-rus-informoj)

INTERNACIA KONFERENCO EN RUSIA AKADEMIO



Gennadij Miĥajloviĉ Ŝilo

La 13-an de aprilo en Moskvo, en la sidejo de Rusia Akademio pri Klerigo, okazis Internacia konferenco "Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de fremdaj lingvoj". La celo de la konferenco estis pridiskuti la iniciaton de sciencistoj-esperantistoj enkonduki Esperanton en studplanojn de diversnivelaj klerigejoj de Rusio. La konferencon partoprenis 48 personoj el 7 landoj (Hungario, Germanio, Japanio, Nederlando, Rusio, Ukrainio, Usono), 26 el ili – neesperantistoj.

El neesperantistoj al la konferenco estis invititaj funkciuloj el la Ministerio pri Klerigo kaj Scienco de RF, Rusia Akademio pri Klerigo (RAK), Moskva Ŝtata Lingvistika Universitato (MŜLU), reprezentantoj de Rusia kaj Moskva Dumaoj kaj el aliaj institucioj. Estis invititaj ankaŭ ĵurnalistoj el televido (moskvaj kanaloj "TV-Centr", "Podmoskovje") kaj gazetaro ("Rossijskaja gazeta", "Veĉernjaja Moskva", "Gazeta.ru", "Planedo.ru").

La diskuton partoprenis speciale invititaj eksterlandaj gastoj: prof. György Nanovfszky el Hungario, prof. Günter Lobin el Germanio, prof. Akira Morita el Japanio, doc. Wim Jansen el Nederlando, Mikaelo Lineckij el Ukrainio kaj Steven Cobb el Usono.

La ĉefa oponanto prof. Irina Ĥaleeva el MŜLU, doninta antaŭe negativan respondon pri la indikita problemo, al la konferenco ne venis.

La enkondukajn parolojn por la diskuto faris prof. Nikolaj Nikandrov, prezidanto de RAK, kaj prof. Gennadij Ŝilo, rektoro de Eŭropa Universitato Justo. Dum kafpaŭzo la reprezentanto de la Ministerio s-ino Nelli Rozina deklaris: "Atendu de la Ministerio neniun subtenon kaj eĉ ne turnu vin al ni. Ni nenion decidados". El tiu deklaro eblas konkludi kun granda grado de vero, kial el la 9 personoj, rekomenditaj de la Ministerio kaj RAK por la konferenco, partoprenis nur 2 kaj kial ili evitis pridiskuton kaj akcepton de la rezolucio: atenco obstrukci la aranĝon. Tio tamen ne havis sukceson, ĉar post viglaj diskutoj pri la titola problemo la ĉeestantoj unuanime akceptis rezolucion, pledantan subteni efektivigatajn en Rusio eksperimentojn celantajn riveli kaj konfirmi propedeŭtikan valoron de Esperanto kaj enkonduki la internacian lingvon Esperanto en studplanojn de rusiaj klerigejoj samrajte kun ĉiuj aliaj fremdaj lingvoj kiel propedeŭtikan rimedon antaŭ lernado de fremda lingvo.

Laŭ la materialoj de la konferenco Justo eldonos libron kun tekstoj de elpaŝoj kaj videofilmon.

Liana Tuĥvatullina, vic-rektoro de Eŭropa Universitato Justo

РЕЗОЛЮЦИЯ

Международной конференции “Пропедевтическая роль эсперанто в изучении иностранных языков”

13 апреля 2007 г. *г. Москва*

- Соглашаясь с обоснованностью рекомендаций Резолюций Генеральной Ассамблеи ЮНЕСКО (1954, 1985) о введении международного языка эсперанто в учебные планы образовательных учреждений стран-членов;
- учитывая международный положительный опыт экспериментального преподавания эсперанто в качестве пропедевтического средства на протяжении последних более чем 100 лет (Великобритания, Венгрия, Германия, Италия, Россия, Словения, США и др.);
- отмечая уникальную роль ежегодных международных конгрессов эсперантистов как средства общения и взаимопонимания без переводчиков представителей различных государств;
- оценивая современное значение эсперанто как основного языка международного сотрудничества в областях науки, техники, литературы, искусства и других сферах, в деятельности Международной Академии Наук Сан-Марино, Международной Академии «Комениус» (Словакия), Академии эсперанто (Франция) и многих других активно функционирующих на языке эсперанто международных учреждений;



Magomet Izmajloviĉ Isajev

- отдавая должное языку эсперанто как средству, способствующему искоренению ксенофобии, национальной и религиозной неприязни;
- подтверждая, что язык эсперанто никоим образом не имеет целью заменить собой какой-либо из этнических языков, а напротив, призван способствовать сохранению языков всех народов, в том числе самых малочисленных;
- обращая внимание на то, что на эсперанто в различных государствах издается оригинальная литература – художественная (в т.ч. детская), научная, техническая, юридическая, медицинская и др., а также осуществляются переводы с национальных языков на эсперанто и с эсперанто на языки народов мира;
- стремясь шире использовать язык эсперанто в качестве пропедевтического средства при изучении иностранных языков;
- принимая во внимание результаты практического обучения языку эсперанто, свидетельствующие о многократно более легком овладении этим языком, чем любым этническим;
- полагаясь на заключения Международной эколого-лингвистической экс-

пертной комиссии о целесообразности изучения эсперанто в средних и высших учебных заведениях;

- учитывая заключение кафедры международных языков Европейского университета Justo о беззатратности введения эсперанто в учебные планы;

конференция считает необходимым обратиться к Министру образования и науки Российской Федерации с предложением поддержать проводимые в России эксперименты по выявлению и подтверждению пропедевтической ценности эсперанто и ввести международный язык эсперанто в учебные планы образовательных учреждений России наравне со всеми другими иностранными языками как пропедевтическое средство перед изучением иностранного языка.

ĈU LEGI AŬ NE LEGI?

Ĝuste tiel staras nun la demando.

Komence de la jaro Prezidento de Rusio pere de centra ŝtata televida programo notis senprecedencan malgrandiĝon de intereso al librolegado en la lando. La revenigo de la antaŭa intereso al la libro estis anoncita kiel unu el prioritataĵoj de la registaro. Do, la demando “Ĉu legi aŭ ne legi?” havas politikan signifon. Kial?

Laŭ supozoj de lingvistoj en la mondo ekzistis dum la tuta homa historio 700–800 miloj da lingvoj, nun restas kelkaj miloj, kaj ne malpli ol 25 el ili ĉiujare malaperas. Probable unuavice malaperas la lingvoj, kiuj estas nur parolataj, sed ne havantaj evoluintan skriban kulturon. Kaj kontraŭe, la latina lingvo, kvankam ĝi ne estas monde parolata, portis kaj daŭre portas tra jarcentoj sian kulturon kaj sciojn nur dank’ al sia skriba heredaĵo.

Ne estas sekreto, ke kvanto de legantoj en Esperanto estas mizera. Esperanto-instruistoj ofte rakontas al mi, ke iliaj lernantoj rezolute rifuzas legi E-librojn. Eble instrua procedo estas ne sufiĉe orientita por elvoki ĉe lernantoj intereson al legado? Mi memoras penojn de nacilingvaj instruistoj (almenaŭ tio estis antaŭe), kiam ili dum multaj monatoj, ofte dum jaroj infektis la lernantojn per viruso de legovermo, paŝo post la paŝo, ĝis la legado, anstataŭ turmenta malagrablaĵo, iĝas natura bezono. Multaj E-instruistoj tradicie dum la kursoj praktikas nur parolatan lingvon. Tio estas komprenebla prahistoria deziro de esperantistoj – tuj montri, ke Esperanto estas viva kaj parolata. Kaj la procedo de konatigo kun la beletro restas eksterinstrue. Ofte tio okazas pro pigreco de la instruisto. Rezulte, aktivaj post la kurso restas ne pli ol 10% de la lernantoj, kaj legas librojn el ili – proksime al nulo.

Ekzistas opinio, ke E-literaturo troviĝas en embria stato, kaj montri ĝin al ekstera publiko estas eĉ honte. Ne estas tiel. Se ni forstrekos el la ekzistantaj lingvoj la supran dudekon de la plej disvastigitaj (precize oni nomas 27 lingvojn, kiujn parolas pli ol 70% de la Tera loĝantaro), do el la restintaj 99%, ĉu multaj el ni povus nomi almenaŭ du-tri konatajn por ni aŭtorojn? Esperanto-literaturo, kaj originala, kaj, kio estas eĉ pli grava, tradukita, sendube okupas lokon en la unua cento de la lingvoj. La alia afero estas la mizera kvanto de legantaro. Dum Universalaj Kongresoj en fakaj kunsidoj mi ofte aŭdis ŝercan opinion de konataj esperantistoj, ke legantoj en Esperanto estas malpli multaj ol verkistoj kaj

eldonistoj. Se kalkuli niajn libroŝatantojn kaj legantojn, do ilia kvanto apenaŭ superos centon. Nia leganta E-komunumo estas konstruita laŭ modelo de fermita "fan-klubo", en kiu ĉiuj konas unu la alian, ĉiuj mem plej ofte estas samtempe kaj legantoj, kaj eldonantoj, kaj verkistoj-tradukistoj, kaj ankaŭ kritikistoj.

De unu flanko, tiu modelo ebligas garantii por la E-eldonistoj disvendon de certa eldonkvanto, kaj al la legantoj – aĉeton de dezirata libro. Supozate, la libron povas aĉeti ajna scivolema persono, sed en vero homo ne eniranta tiun malvastan "amikan rondon" definitive stumblas ĉe multaj obstakloj: nesufiĉa kono de la lingvo, alta prezo de la libro, manko de UEA-konto, manko de intereso ĉe la konformiĝinta komunumo uzi aldonajn fortojn por reklami sin.

De alia flanko, tiu klubo nepre havas tendencon al kultura degradiĝo ĝuste dank' al sia memsufiĉa izoleco, en kiu mankas efektiva krea konkurenco. Rompi tiun sorĉan cirklon povas nur politika decido pri signifo de E-legado (ne nur aĉetado de E-libroj!). Lingvo nelegata ĉiam restas en ruĝa zono de pereontaj lingvoj.

Por igi homojn legi en Esperanto povas ekzisti multaj vojoj, de personaj pruvoj ĝis vastaj mondskalaj kampanjoj. Ekzemple, granda kvanto de E-poetoj en Moskvo, kiel mi ŝatus supozi, sekvas el senprecedenca multjara agado de Boris Vladimiroviĉ Tokarev, kiu dum siaj pluraj lekcioj pri E-literaturo sukcesis inokuli al aŭskultantoj siajn intereson kaj ŝaton.

Jen, ekzemple, ankoraŭ unu vojo. En la pasinta jaro la eldonejo "Impeto" donacis al ŝtataj bibliotekoj ***laŭ ilia peto*** po ĉ. 20 ekz. de "La Unua Libro" kaj lernolibro de Junusov. Sed kion sola povas fari la malgranda membilanca eldonejo kompare al la landa E-asocio? La deponata en biblioteko sola libro servas al centoj da legantoj kaj por kelkaj generacioj. Ĝi atingas homojn, kiuj pro diversaj kialoj, ofte pro manko de mono, ne povas aĉeti esperantaĵojn en librovendejoj. Laŭ efiko, enkonduko de E-libroj en publikajn bibliotekojn, verŝajne, egalas al enkonduko de Esperanto en mezlernejojn. Sed kontraŭe al la lasta, ĝi ne postulas politikajn solvojn, por ĝi estas bezonata nur bona volo. Kompreneble, por REU-Estraro eble ekzistas pli grandskalaj taskoj, ekzemple diversaj Interret-projektoj. Sed ĉu estas superforta tasko por lokaj E-kluboj proponi almenaŭ po 2–3 E-librojn al apudaj distriktaj bibliotekoj? Mi certe scias, ke niajn librojn oni bonvenigas ankaŭ en bibliotekoj de infanaj internulejoj.

Antaŭe tiu laboro eniris la ŝtatan klerigan programon. Ĉiu esperantisto scias pri fabelaj eldonkvantoj de E-lernolibroj kaj vortaroj en USSR. Sed malmultaj estas informitaj, ke konsiderinda kvanto de la eldonita – miloj da ekzempleroj – estis aĉetataj ĉe eldonejoj far la ŝtato mem por dissendado al enlandaj bibliotekoj. (Foje, en la eldonejo "Progress" mi eĉ luktis kontraŭ tio, dezirante lasi pli grandan stokon da E-libroj por esperantistoj.)

Proksimume antaŭ deko da jaroj al la eldonejo "Impeto" venis el iu malgranda provinca urbo kupono de "La Unua Libro" de d-ro Zamenhof kun promeso lerni Esperanton. Mi estus ĝoja, se post aldona cento da jaroj la samaj kuponoj daŭre flugus tra la mondo.

Aleksandr Ŝevĉenko (Moskvo)



STATISTIKO

Tjumenj, 29 aprilo – 1 majo 2007

Entute la renkontiĝon partoprenis 43 personoj el 8 lokoj: Tjumenj – 18, Jekaterinburg – 14, Novosibirsk – 3, Ĉeljabinsk – 2, Kogalim (Tjumena regiono) – 2, Toboljsk (Tjumena regiono) – 2, Niĵnij Tagil (Sverdlovska regiono) – 1, Rostov-na-Donu – 1. Inter la partoprenantoj estis 15 viroj kaj 28 virinoj. Junularon ĝis 30 jaroj konsistigis 22 personoj, el kiuj estis 3 lernejanoj kaj 2 infanoj. La plej aĝa partoprenanto (N.Popov) aĝis 72 jarojn, la plej juna (A.Mamkina) – 1 jaron kaj 4 monatojn. La plej granda E-staĝo estas 42 jaroj (A.Melnikov). Laŭ la E-staĝo la esperantistoj dividiĝis jene: malpli ol 1 jaro – 6 personoj, de 1 ĝis 5 jaroj – 8 personoj, de 5 ĝis 10 jaroj – 7 personoj, de 10 ĝis 20 jaroj – 4 personoj, de 20 ĝis 30 jaroj – 13 personoj, de 30 ĝis 40 jaroj – 4 personoj, pli ol 40 jaroj – 1 persono.

PRIMAVERA FESTO EN TJUMENJ

Nokta trajno, radofrapoj – kaj jen per printempa pluveto nin renkontas la matena Tjumenj. Ĝojkrioj, kisoj, brakumoj de alvenantaj aliurbaj amikoj – kaj la gaje zumantan amason da jekaterinburgaj, tjumenaj kaj novosibirskaj esperantistoj jam englutas la tuj plenŝtopiĝinta buso. Ni startas al Vinzili – la ĉi-jara insulo de Esperanto sur la ural-siberia mapo. Do, saluton, nia longe atendata EsPrimo!

En la bazejo nin atendas komfortaj ĉambroj, tagmanĝo kaj – ne plu libertempo, ne plu satdormo, ĉar ekkaruselas jam la streĉe bunta programo.

Ĉio komenciĝas de la plej alloga por mi programero – la honora gasto de la renkontiĝo Aleksandro Melnikov (Rostov-na-Donu) prezentas sian unuan prelegon "Eĉ esperantistoj kapablas ŝerci (pri vortludoj en Esperanto)". Diri, ke la serio el 3 liaj prelegoj, aŭ eĉ pli ĝuste konversacioj, bazitaj je la doktora disertacio, estas in-



la spertula parto de la partoprenantoj

teresa kaj atentokapta – estas diri nenion. Ĝi estas vera frandaĵo, pensiga, instrua kaj sprita! Mi menciu nur, ke post tiom brila prezento la monografion "Lingvokulturologiaj aspektoj…" (aŭ la "verdan libron de maldecaĵoj", kiel oni ŝerce nomis ĝin post la prelegoj…) atendis tuja disvendo, oni elpetis eĉ la aŭtoran ekzempleron, nenio restis por la posta interlingvistika prelego en Ĉeljabinsk kaj donacado al bibliotekoj en Kazanj...

Rememorante kun nostalgio la jam pasintajn EsPrimojn mi vidas, ke ĉiu el ili havis propran unikan "vizaĝon", eĉ malgraŭ la preskaŭ samaj amikaj vizaĝoj ĉirkaŭe. Nur varma etoso kaj inspira printempa humoro ĉiam restis senŝanĝaj.

Antaŭ jaro EsPrimo en Toboljsk estis precipe porkomencanta, ni dediĉis ĝin plejparte al la nova generacio kaj ĉi-foje jam povis ĝui la unuajn rezultojn. La renkontiĝo "maturiĝis" enhave. La pasintjara paroliga kurso cedis sian lokon al la seminario por instruemuloj, sukcese gvidata de nia ĉiam ridetema juna "diktatoro" Aleksandr Osincev el Jekaterinburg. Ni jam ne devis varti kaj distri komencantojn – ili mem plej aktive zorgis pri la programo. Saŝa Osincev kaj Arina Osipova (Jekaterinburg) preparis kaj gvidis "Amikan vesperon", prezentinte prologe kortuŝe ĉarman scenon el "La eta princo" de A. de Saint-Exupéry. Kaj plej agrabla surprizo por ĉiuj estis solena anonco pri la fondo de nova junulara klubo "Arĝenta flamo" en Jekaterinburg!


la teamo, kiu prezentis la spektaklon

Grava arta evento de la renkontiĝo estis sukcesa premiero de la longe atendata spektaklo "Persika Nubeto" laŭ fabelo de V.Eroŝenko, kiun donacis al la spektantoj teamo de tjumenaj kaj jekaterinburgaj gejunuloj gvide de Marina Stepaĉova (Tjumenj).

Kio do restis por "malnovuloj"? Nu, certe ĝuinda "Nostalgia vespero"! Kiom da belaj historioj el la vivo de uralaj esperantistoj ni aŭdis, refreŝigante en la memoro admirindajn momentojn de nia E-juneco, kiom da fotoalbumoj ni trafoliumis, ĝoje rekonante aŭ ne rekonante unu la alian sur malnovaj fotoj, kiom da ŝatataj kantoj sonis gitarakompane!

Serioza kaj utila estis diskuto pri la regiona agado kun interkluba spertinterŝanĝo, resumoj de ĉi-jara agado kaj planoj por la sekva periodo.

Kaj certe, post streĉa taga programo noktoj kunvenigis nin en amikan rondon kun teumado, babiladoj kaj kantoj ĝis mateniĝo, ja nia renkonto estas tiom mal-



longa kaj malŝpari tempon por dormado estus tute neimageble!

La sukceson de ĉi EsPrimo ni ŝuldas unuavice al Raja Kudrjavceva, kiu gvidis kaj kunordigis la tutan renkontiĝon, kaj certe ni estas ege dankaj al niaj junaj mastroj el Tjumena EK "Revo", aparte al Pavel Veselov, Ksjuŝa Baklickaja kaj Olja Bukina, kiuj senlace zorgis pri niaj loĝado-manĝado kaj ĉiuj teknikaj servoj kaj organizis por ni dum la rea vojo interesegan ekskurson al "Arkeologia muzeo-rezervejo"! EsPrimo-4 finiĝis. Bonvenon al EsPrimo-5!

Galina Terentjeva (Ĉeljabinsk)

SEMINARIO POR INSTRUEMAJ ESPERANTISTOJ

Tio komenciĝis jam delonge….


Dum Silvestro mi partoprenis seminarion "Gvidu la flugilojn", kiun gvidis Irina Gonĉarova. La seminario estis ne nur interesa, sed ankaŭ utila por mi. Ni interŝanĝis spertojn de Esperanto-instruado kaj ellaboris programon por seminario "Flugiloj de malfacila vento". Sed por iĝi vera trejnisto kaj ricevi rajton instrui dum tiu seminario ni, partoprenantoj de "Gvidu…", devas staĝi dum grandaj Esperanto-aranĝoj. Por ne perdi tempon kaj entuziasmon mi komencis mian staĝadon tuj post tio, kiam mi revenis el eksterlando.

Antaŭ nia regiona renkontiĝo mi aperigis reklamon en regiona dissendolisto kaj en la regiona retpaĝaro <www.ural-sib.org>. Partoprenontoj devis prepariĝi por la seminario, kiun mi planis organizi: sendi demandaron kaj planon de 15-minuta lecioneto, kiuj estis ellaboritaj de la teamo en Pollando dum la seminario "Gvidu la flugilojn". Dum regiona renkontiĝo de uralaj kaj siberiaj esperantistoj EsPrimo-4 en Tjumenj mi okazigis seminarion por instruemaj esperantistoj, kiu estis kompilita laŭ la modelo de la seminario "Flugiloj de malfacila vento".



Anastasija Golovkina

Ĝustatempe aliĝis 3 personoj, kiuj poste aktive partoprenis la seminarion: Arina Osipova (Jekaterinburg), Marina Stepaĉova (Tjumenj)



Arina Osipova

kaj Anastasija Golovkina (Tjumenj). Unu el ili jam instruas, du aliaj intencas. Pro tio, ke la aranĝo okazis dum 2 tagoj, mi planis seminarion por 4 horoj (du poduhoraj programeroj), sed pro teknikaj kialoj la seminario daŭris dum 6 horoj. La dua planita duhora parto daŭris 4 horojn, ĝis la kvara matene. Ĉu vi povas imagi, ke junaj esperantistoj sidis dum kvar horoj nokte, diskutis kaj babilis pri pedagogio anstataŭ dormi aŭ etosumi?

La seminario enhavis jenajn temojn: kio estas instruado de lingvoj, metodoj de Esperanto-instruado, kiel organizi kurson (loko, tempo, reklamo ktp.), planado de lecionoj, kia estu instruisto (profesiaj kaj karakteraj trajtoj). Malgraŭ tio, ke la seminario enhavis diversajn temojn, ĝi ne iĝis ĥaosa, sed estis kompleksa. La programo de la seminario "Flugiloj de malfacila vento" konsistas el metodika kaj gramatika partoj. Mi okazigis nur metodikan parton kun aldono de organizaj temoj (kie trovi lokon, tempon k.t.p.), pro manko de tempo mi devis ellasi la gramatikon.

Dum la dua tago oni prezentis 15-minutajn lecionetojn, kiuj estis interesaj kaj viglaj. Tiun parton partoprenis ekstera publiko, kiu rolis kiel lernantoj. La ejo, kie okazis la seminario, por 45 minutoj iĝis lernoĉambro, en kiu regis metodiko kaj entuziasmo de kreemaj "instruistoj". Unu "lernanto" eĉ donacis ĉokoladon al ĉiu seminariano. Ĉiuj partoprenantoj planas komenci kurson post la seminario. Mi esperas, ke en niaj rusiaj aranĝoj baldaŭ tiaj seminarioj iĝos tradicio, ĉar sen instruistoj la movado ne ekzistos.

Aleksandr Osincev (Jekaterinburg)

INTERLINGVISTIKA PRELEGO EN ĈELJABINSK

Sukcese pasis dutaga vizito de profesoro Aleksandr Melnikov (Rostov-na-Donu) al Ĉeljabinsk post EsPrimo-4. La 2-an de majo dum la kluba kunveno ĉeljabinskanoj plezure konatiĝis kun la fama esperantisto kaj aŭskultis lian rakonton pri la Internacia konferenco ĉe Rusia Akademio pri Klerigo en Moskvo.



La 3-an de majo Aleksandr Melnikov vizitis la fakultaton de lingvistiko kaj tradukado de la Ĉeljabinska Ŝtata Universitato, kie okazis lia plensukcesa prelego "Интерлингвистика – золушка языкознания?" (Interlingvistiko – ĉu cindrulino de la lingvoscienco?). Dank' al tre favora rilato al Esperanto de la dekano, doktoro

de filologiaj sciencoj profesoro L.Nefjodova, la prelego estis bonege organizita. Ĉiuj 130 lokoj en granda aŭditorio estis okupitaj. Ĉeestis ne nur studentoj, sed ankaŭ 16 pedagogoj kaj sciencistoj (en la fakultato estas instruataj 5 lingvoj). Estis prezentita malgranda ekspozicio de E-libroj kaj revuoj. La prelego pasis tre vigle kaj malenue, Aleksandro sukcesis plene kapti la atenton de la ĉeestanta junularo, kiu aktive reagis: estis multaj demandoj, al kiuj venis ĉiam trafaj kaj spritaj respondoj. Rezulte multaj studentoj kaj eĉ instruistoj esprimis deziron lerni Esperanton. La dekano promesis serĉi eblon inviti A.Melnikov por gvidi specialan kurson, al studentoj estis rekomendite uzi interlingvistikon kiel temon por studaj referaĵoj.

Post la prelego la gaston intervjuis ĵurnalistoj, kaj vespere en la novaĵprogramo de la urba televidkanalo "Vostoĉnij ekspress" okazis kelkminuta rakonto pri la prelego, dum kiu estis prezentitaj ankaŭ tre pozitivaj opinioj de la dekano kaj de kelkaj studentoj pri Esperanto kaj ĝiaj perspektivoj. Fakte, en la ĵurnalista komento ne mankis eraroj kaj elpensaĵoj – ĝin eblas nomi "favore fantazia" rilate al Esperanto, sed entute la elsendo lasis ege pozitivan impreson pri la lingvo.

Similaj prelegoj de A.Melnikov pri interlingvistiko kaj planlingvoj okazis ankaŭ antaŭ EsPrimo-4: la 27-an de aprilo en la Ŝtata Pedagogia Universitato ĉe la Instituto de fremdaj lingvoj en Jekaterinburg kaj la 28-an de aprilo en la Tjumena Ŝtata Universitato ĉe la filologia fakultato.

Vjaĉeslav Roĵdestvenskij, Galina Terentjeva (Ĉeljabinsk)

JUBILEO DE NATALIA RAJSKAJA

La 1-an de junio festis sian jubileon Natalia Rajskaja, apenaŭ konata ekster Tiĥvin kiel esperantistino (ĉar handikapito), sed verŝajne la plej konata persono el inter esperantistoj en la regiono, kiel socia aganto kaj poetino. Dum multaj jaroj ŝi estis elektata prezidi la regionan organizaĵon de handikapitoj, laboris en la regiona deputita konsilantaro; nuntempe ŝi reprezentas en Tiĥvin la deputiton de Leningradregiona parlamento. Sinceraj kaj sentoriĉaj poemoj de Natalia Rajskaja estis publikigitaj en multaj revuoj kaj almanakoj ruslingvaj; ŝiaj esperantlingvaj poemoj aperis en "Scienco kaj Kulturo".

La 31-an de majo dum vespera, la plej spektata, TV-tempo la regiona televido prezentis intervjuon kun Natalia Rajskaja. I.a. ŝi rakontis pri sia esperantisteco ekde 1973 kaj pri grava rolo de E-o en ŝia vivo. Tiĥvina E-Klubo (TEK) gratulas la jubileantinon kaj deziras al ŝi konvenan sanon por la ŝatata laboro kaj kreado.

Viktoro Kandalinskij,
prezidanto de TEK



Bulteno de REU

KIAL UK EN 2009 NE OKAZOS EN RUSIO

Kiel vi povis legi en la antaŭa numero de REGo, dum kelkaj lastaj monatoj moskva iniciata grupo kun subteno de REU okupiĝis pri la preparlaboroj cele inviti al Rusio Universalan Kongreson de Esperanto en 2009 aŭ 2010. Tiun ĉi iniciaton subtenis per speciala decido la 23-a Konferenco de REU (en la decido temas pri la invito "...en 2009 aŭ postaj jaroj"). Plejmulto de la iniciata grupo tamen esperis okazigi la Kongreson en Rusio en 2009, kvankam por tiu jaro jam kandidatis Pollando. Kaj jen, en sia aprila kunsido la Estraro de UEA decidis, ke en 2009 UK okazos en Pollando. Kelkaj aktivuloj perceptis tion kavazaŭ neglekton de rusia propono flanke de UEA. En la reta diskutlisto <reu-agado> ekestis akra diskuto pri tiu temo. Tamen klarigoj, venintaj al <reu-agado> de la UEA-Prezidanto Renato Corsetti kaj la Ĝenerala Direktoro Osmo Buller, komprenigis, ke neniu neglekto havis lokon. Ĉi-sube vi povas legi la klarigojn de Osmo Buller. ***(G.Kokolija)***

Ne nur lastatempe sed jam de kelkaj jaroj okazis diskutoj en REU pri invito de UK al Rusio. Antaŭ du-tri jaroj vi eĉ decidis inviti UK al Soĉi, sed tiu ideo fine forfalis. Andrej Grigorjevskij tenis min informita pri la plej lastatempa diskuto, kaj mi klarigis al li, ke invito por 2009 estus vana perdo de tempo, ĉar la momento estis jam multe tro malfrua. Jam en 2005 komenciĝis diskuto pri UK en Pollando por omaĝi la 150-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. La iniciatinto de tiu ideo estis Fondaĵo Zamenhof en Bjalistoko, kiu en februaro 2006 sendis invitleteron al UEA kun oficiala apoga letero de la urbestro de Bjalistoko. En marto 2006 UEA ricevis inviton ankaŭ de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio. Fine de marto 2006 la Estraro de UEA komisiis min vojaĝi al Pollando por esplori surloke la kondiĉojn kaj viziti ankaŭ aliajn urbojn krom Bjalistoko. Tio praktike signifis elekton de Pollando kiel kongreslandon kaj restis nur la demando, en kiu urbo la kongreso okazu.

Mi ĉiam supozis, ke la situacio rilate UK en 2009 estis sufiĉe klara al la respondeculoj de REU. Verdire, kiam mi eksciis, ke la Konferenco de REU en marto decidis inviti UK por 2009 aŭ iu posta jaro, mi supozis, ke la jaro 2009 restis en via decido pro diplomatiaj kialoj, ĉar vi estis parolintaj pri tiu konkreta jaro kun urbaj instancoj. Ke vi ne limigis la inviton nur al tiu jaro, rezultis laŭ mia supozo el tio, ke vi estis informitaj pri la fakta ne-ebleco de tiu jaro. Kvankam ĝis la kunsido de la Estraro de UEA (13-15 aprilo) ne venis oficiala invito de REU, mi informis la Estraron pri via decido, kun aparta kontento pri tio, ke REU decidis inviti UK ne por unu jaro ekskluzive sed por nedifinita jaro. Ĉar oficiala dokumento pri via decido mankis, neniu decido bezonis esti farita de la Estraro.

La 27-an de aprilo, du semajnojn post la estrarkunsido, mi ricevis retmesaĝon de prof. Gennadij Ŝilo kun skanaĵo de invitletero, kies unua subskribinto estas li

mem kiel kunordiganto de la iniciata grupo pri la invitado de UK al Rusio kaj kiun krome subskribis Svetlana Smetanina (Moskva E-Centro), Aleksandr Ŝevĉenko ("Impeto") kaj Vladimir Samodaj ("Scienco kaj Kulturo"). Mirigis min en tiu letero, ke ĝi venis ne de REU. La invito krome estas ekskluzive por 2009 kaj sekve malkongruas kun la decido de la Konferenco de REU. La letero ankaŭ kulpigas Andrej Grigorjevskij: "...sendon de la invito spite al kolektiva decido prokrastis laŭ la persona decido REU-prezidanto". Mi lasas al vi juĝi, ĉu via prezidanto agis prudente, ŝparante al REU oficialan rifuzon fare de UEA kaj la embarasojn, kiuj sekvus el tio. Vi tamen ne povas kulpigi lin pri tio, ke UEA ne estus informita pri la decido de via Konferenco. Alia afero estas, kial la malfrue sendita kaj en si mem jam nenecesa invitletero konfliktas kun la decido de REU. Se mi povas fidi la informojn kaj dokumentojn, pri kiuj mi disponas – laste la raporto pri la REU-konferenco en REGo – la Konferenco ne limigis la inviton al 2009.

Mi konsilas al vi ĉesi kulpigi unu la aliajn ĉirkaŭ la invitado de UK al Rusio. ***UEA restas interesita pri okazigo de UK en via lando kiel eble plej baldaŭ.*** Bv. tamen konscii, ke al la kondiĉoj, kies plenumitecon UEA postulas, apartenas ne nur fizikaj faktoroj kiel ekzisto de taŭgaj ejoj por UK, varia oferto de loĝebloj, facila atingeblo de la urbo, ktp. La esperantistaro de la lando kaj la urbo devas esti matura por akcepti tiun plej grandan unuopan organizan defion de la Esperanto-movado, kies plenumo eblas nur per kunlaboro kaj reciproka harmonio.

Kun esperantistaj salutoj,

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA

EKVILIBRO POST TRIJARA LABORO DE LA ESTRARO

La Estraro de UEA, elektita en la Pekina UK en 2004, kunsidis en Roterdamo de la 13-a ĝis la 15-a de aprilo. Temis pri la lasta ordinara kunsido de la Estraro, kiu ja ankoraŭ kunsidos komence de la UK en Jokohamo, sed tie ĝi traktos nur la lastajn teknikajn demandojn pri la kongresa programo kaj la unua kunsido de la Komitato. La restantaj monatoj de la mandato tamen ne signifas feriadon por la estraranoj: ili restas plene okupitaj ĝis la UK kaj laŭbezone faros decidojn rete. Krom ĉiuj estraranoj ĉeestis la Ĝenerala Direktoro, Konstanta Kongresa Sekretario, redaktoro de "Esperanto" kaj observantoj de TEJO (Chuck Smith) kaj ILEI (Zsofia Korody).

Plejparto de la tagorderoj de la aprila kunsido ĉefe rilatas al la preparado de la kunsidoj de la Komitato, al kiu la Estraro devos raporti pri sia agado en la antaŭa jaro kaj proponi buĝeton kaj aliajn planojn por la venonta jaro. La agadraporto pri 2006 estis jam praktike preta, sed ekestis diskuto pri tio, kiom detala ĝi devus esti. La konkludo estis klopodi iom koncizigi ĝin antaŭ ĝia aperigo en la junia numero de "Esperanto". Pro personaraj problemoj en la Centra Oficejo la financaj raportoj ankoraŭ ne pretis. Ĉar la plej gravaj eroj de la spezokonto tamen estis finkalkulitaj, estas jam klare, ke en 2006 la en- kaj elspezoj ekvilibriĝis. La buĝeto de 2006 antaŭvidis negativan saldon de 8650 eŭroj, sed la fina minuso estas nur kelkcent eŭroj. Por la jaro 2008 oni proponas plene ekvilibran buĝeton. La Estraro enoficiĝis fronte al deficito de 57194 eŭroj en 2003 kaj povas do kalkuli la financan resanigon de la Asocio inter siaj ĉefaj atingoj.

Oni konfirmis la konsiston de la Loka Kongresa Komitato de la 93-a UK en Roterdamo (19-26 julio 2008) kun Ans Bakker-ten Hagen kiel prezidanto. La estraranoj diskutis ankaŭ pri la temo de tiu UK, sed ĝi ankoraŭ atendas finan vortumon. Ĉar en 2008 oni festos la 100-jariĝon de UEA kaj ĉar ĝi estos Internacia Jaro de la Planedo Tero, oni klopodas kunigi ambaŭ aferojn sub sama temo. Por trovi taŭgan kaj elegantan vortumon la Estraro atendas proponojn ankaŭ de komitatanoj kaj aliaj interesitoj. La elektado de la loko por la UK en 2009 proksimiĝas al la fina decido. La Estraro definitivigis, ke ĝi okazos en Pollando por festi la 150-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L.L.Zamenhof. La fina elekto inter Bjalistoko kaj Poznano okazos en Jokohamo.

La Estraro benis formale la jam pli fruan intencon transdoni la premiitajn verkojn de la Belartaj Konkursoj por publikigo en la nova revuo "Beletra Almanako", kiun la eldonejo "Mondial" lanĉos ĉi-jare. Al la eldonserio "Oriento-Okcidento" estis akceptita nova titolo, "Maitreyi" de la granda rumana verkisto Mircea Eliade, aperonta ĉe la eldonejo "Bero". La 23-a okazigo de la fama Esperanto-aranĝo "ARKONES" en Poznano (21-23 septembro 2007) ricevis aŭspiciojn de UEA.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

GERMANA E-KONGRESO KUNVENIS EN HAMBURGO

"Esperanto helpus plifortigi la Eŭropan identecon". Tian opinion esprimis d-ro Seán Ó Riain en sia prelego en la Germana Esperanto-Kongreso. La irlanda ambasadoro en Bruselo kaj prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio estas konvinkita, ke ĝuste lige kun la multlingveco en la Eŭropa Unio pli da justeco en la lingva politiko donus pli da efikeco. Helpe de Esperanto oni povus malpliigi la komplikan kaj temporaban traduklaboron en la institucioj de la EU.

La prelego de Ó Riain estis unu de la kulminaj punktoj en la ĉi-jara Germana Esperanto-Kongreso, kiu okazis de la 25-a ĝis la 28-a de majo en Hamburgo. La fokusa temo de la kongreso estis "Hamburgo – la kreskanta urbo". La 172 partoprenantoj, inter ili gastoj el Danlando, Nederlando kaj Britio, el Pollando, Hungario kaj Latvio, el Kazaĥio kaj Bulgario, sin okupis i.a. pri la urba evoluo el ekonomia vidpunkto (d-ro Werner Bormann, Hamburgo) kaj pri la problemo de "urbo-ŝrumpado" (Peter Kuehnel, Berlino). La bildon de la prelegoj kompletigis ekskursoj, i.a. en la estiĝantan "havenurbon" kaj al la renversa flanko de la kreskanta urbo, la vivmedio de la senhejmuloj. La aranĝon kronis riĉa kulturprogramo, ekz. koncerto de la fama nederlanda grupo "Kajto" kaj kantado de "Shanty-koruso Henneberg-Buehne Poppenbaettel".

La plej grava punkto en la tagordo de la GEA-membrokunveno estis la elekto de nova estraro. D-ro Rudolf Fischer, lingvisto kaj privata docento pri medicina informadiko kaj biometrio el Nordwalde apud Muenster, estis elektita kiel prezidanto, Andreas Emmerich – kiel vicprezidanto kaj Pit Hauge – kiel trezoristo; Wolfgang Bohr, Andreas Diemel, d-ro Joerg Gersonde, Sebastian Kirf, Christof Krick kaj d-ro Rainer Kurz kiel kromaj estraranoj. ***(landa-agado)***

NOVAJ REU-MEMBROJ POR 2007

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Simonov Igorj (Niĵnij Novgorod)

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Moskva EK-MASI (+3 novaj membroj): *Gubina Oljga, Ovsjannikov Anton, Semjonova Natalja*

Volgograda E-klubo "Espero" (10 membroj): *Bikova Ljudmila, Carjova Oljga, Dumler Vera, Jaŝĉuk Jekaterina, Lapŝina Ksenija, Spicina Valentina, Stepanova Marija, Ŝaligina Marija, Taldikina Anastasija, Vtorova Tatjana*

KOTIZOJ DE REU POR 2007

Individua kotizo – 80 rubloj (por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por loĝantoj de aliaj landoj – 8 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron kaj/aŭ Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.

Dumviva kotizo – 2000 rub. (por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por loĝantoj de aliaj landoj – 200 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 30 rub. (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj).

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Subtenkotizoj (ĉio sama kiel por individua kotizo): *REU-subtenanto* – duobla individua kotizo; *REJM-patrono* – duobla individua kotizo.

Kolektiva membrokotizo – 30 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 160 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 150 rub. (ekster Rusio kaj KSŜ – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Membroj de REU aŭtomate iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilon, rublajn kotizojn kaj rabatitajn REGo-abonpagojn sendu (poŝtmandate) al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область.** La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA. (Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <kasisto@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso.)

Eksciu, ke...

PRINTEMPAJ NOVAĴOJ

En aprilo en Eŭropa Jurscienca Universtitato “Justo” okazis “profesora kurso”. En ĝi partoprenis ĉ. 10-14 personoj, kiuj laŭprofesie estas universitataj instruistoj (i.a. profesoroj). La kurson gvidis G.M.Ŝilo, la kurso pasis sukcese. “Justo” eldonis en 2007 novan E-lernilon, speciale destinitan por juristoj, studantaj E-on.

Aleksandr Derjugin, REU-membro de Saratov, trovis en la regiona biblioteko restaĵojn de fama biblioteko de Davidov – unu el E-pioniroj en nia lando. La biblioteko estas menciata en la Enciklopedio de Esperanto. Komence de la 20-a jarcento ĝi estis unu el la plej grandaj kaj plenaj kolektoj de E-eldonaĵoj.

En Lingva Festivalo en Volgograd (15.04.2007) partoprenis 450 personoj. La festivalo daŭre ĝuas subtenon de la regionaj aŭtoritatoj. Ĉi-jare por ĝia okazigo estis buĝetitaj 60 mil rub. Por la sekva jaro oni promesis la sumon pligrandigi. Por la festivalo estis eldonitaj belaj kalendaretoj por 2007-2008.

Dmitrij Ŝevĉenko lanĉis plian retan projekton. Nun tio estas informa retejo <planedo.ru>.

La plej populara moderna E-lernolibro “Esperanto per rekta metodo” de Stano Marĉek estas tradukita al la rusa lingvo. La tradukon faris Bronislav Ĉupin el Iĵevsk. Nun estas serĉata eldonisto.

Estas preskaŭ finita la multjara preparlaboro pri la granda E-rusa vortaro de Boris Kondratjev. Same por ĝi oni serĉas eldoniston.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

INVITO AL JALTA

Pro eventuala tutlanda balotado en Ukrainio fine de junio la organiza teamo de la 13-a Internacia arta E-festivalo “Velura Sezono” decidis ŝanĝi tempon de la festivalo. Ĝi okazos la 27-an de septembro – la 6-an de oktobro 2007 en pitoreska turistejo “Pavlinka” proksime al la aŭtostacio. Krom tri kutimaj koncertoj diverslingvaj por la vasta publiko, nur por la festivalanoj okazos aparta koncerto en Esperanto kaj aŭtoraj koncertoj. En la koncertoj plimultiĝos dancaj eroj kaj aldoniĝos la teatraj. Dum la festivalo abundos ekskursoj kaj turistaj marŝoj. Ekskursoj al muzeoj ankaŭ ĉi-jare estos senpagaj. Eblos malpli kosta loĝado kun siaj dormosakoj. La maro, kiel kutime, estos varma.

La 22-an de junio – la 1-an de julio okazos E-staĝo “Somera sezono-1”, dediĉita al la 30-jara jubileo de la jalta E-klubo “Tero”. La aranĝo okazos en Massandra. Krom E-kursoj en la programo estos ekskursoj, turistado, artprogramo.

Ĉe la renovigata ttt-ejo <www.jaltaespero.narod.ru> eblas trovi la detalojn pri ambaŭ aranĝoj. Bonvenon!

(esperanto-rus-informoj)

ESPERANTA TENDUMADO EN HISPANIO

Esperanta Internacia Tendumado "SenPrograma Renkontiĝo" (SPR) okazos en Hispanio de la 16-a ĝis la 22-a de julio 2007. Kataluna Esperanto-Junularo kaj Valencia Esperanto-Junularo kune kun "Varsovia Vento" organizas ĉi-somere internacian tendumadon sen strikta programo. "Les Fonts del Riu Algar" estas natura areo ĉe la fontoj de la rivero Algar, en la urbo Callosa d' en Sarrià en Valencilando, 64 kilometrojn for de la urbo Alicante kaj 137 – de Valencio.

SPR celas kunigi en tendaro geesperantistojn ĉiajn kaj ĉieajn kaj ĝui internacian etoson. La programon la partoprenantaro faros mem, samkiel la manĝojn, la etoson, kaj ĉion ajn. Oni memzorgu aŭ aliĝu al komuna memzorgado.

En la tendumejo estas duŝoj, necesejoj kaj rostokradoj, krome ni starigos propran kuirejon. En apuda konstruaĵo estos salono, lernoĉambro, gufujo kaj, komprenenble, trinkejo. Ni antaŭplanas inviti lokajn muzikajn kaj kulturajn grupojn, kiuj venos ĝui nian internacian etoson, lerni Esperanton kaj festigi nin. Aliflanke estas planitaj atelieroj pri valencia kulturo, kurso pri kataluna lingvo kaj intensa Esperanto-kurso por neesperantistoj. Krome, eblos plonĝi en la riveron, ekskursi tra belaj montaraj pejzaĝoj, promeni ĉe la rivero, ties akvofaloj kaj lagetoj, iri tra la belaj vojetoj apud la rivero kaj la kanaloj, viziti la muzeon pri la medio kaj pri la akvo kaj trairi la promenejon de aromaj plantoj. La plaĝo troviĝas 15 kilometrojn for, kaj eblas kelkfoje plaĝumi.

La manĝojn kuiros surloke partoprenantoj mem. Ĉiutage oni kreos laborskipon zorganta pri aĉetado, kuirado kaj purigado; ĉiu partoprenanto aliĝu al tiu laborskipo almenaŭ unu tagon dum la tuta restado. Lokaj esperantistoj – spertuloj pri komuna kuirado prizorgos la skipon. La menuoj baziĝos sur loka tradicia kuirarto, kaj ankaŭ estos tre bongustaj vegeteraj pladoj.

Portu viajn tendon, dormosakon kaj matraceton. Muzikistoj portu siajn muzikilojn. Ne forgesu vian bankostumon. Pliaj informoj kaj reta aliĝilo ĉe: <http://www.esperanto.cat/spr/index_eo.html>.

Ĝis tuj' en Esperantuj'!

(esperanto-l)

NOVA VIZAĜO DE ITALA KONGRESO

Kara leganto, ĉi-jare la 74-a Itala Kongreso de Esperanto (Pisa, 1a-5a de septembro 2007) prezentos tute novan vizaĝon, tre allogan ankaŭ por eksterlandaj esperantistoj. Jen estas por vi kelkaj anticipaj informoj.

Unue, memorindas (aparte por tiuj, kiuj ne povis viziti la UK-on en Florenco en 2006, aŭ estis tie tro okupitaj, aŭ tie eĉ pli eksoifis je arto kaj belo), ke Pisa mem estas belega art-urbo, situas en Toskanujo, kaj de tie eblas facile atingi artajn juvelojn same kiel el Florenco. Du postkongresaj tagoj estos dediĉitaj al ekskursoj (Lucca kaj Lunigiana: 2006-09-06; Volterra kaj ĉirkaŭa Etruskujo aŭ San Gimignano: 2006-09-07). La klimato multe pli agrablas ol tiu de Florenco, ĉar la monato septembro estas plej milda kaj Pisa estas proksima al la Mediteraneo. La Pisa-flughaveno estas multaspekte ideala. La loĝkostoj estos pli moderaj ol tiuj en Florenco, kaj malmultekosta solvo estos havebla por gejunuloj.

El kultura vidpunkto, la tradicia formulo estas inversigita: la kongreso okazos ĉirkaŭ tre elstara kleriga programo, anstataŭ male. Imagu: ĉiu kongresano rajtos, *tute senkrompage*, partopreni dum *tri* tagoj, ĝis *ok horojn* ĉiutage, en klerigaj programoj gvidataj de altvaloraj homoj, kiaj estas Katalin Kovats (lingvaj kursoj), Paul Gubbins (moderna didaktiko), Mauro Nervi + Baldur Ragnarsson + Spomenka Štimec (Esperanta literaturo). Krome, eblos partopreni en informadika laboratorio (interalie, *Linux* kaj ties aplikoj) gvidata de Massimiliano della Rovere kaj Claudio Imprenda.

Eblus slogane resumi: *SSS – "Senpage seminariumu septembre" en Pisa, tritage, 24-hore, okaze de la nacia kongreso*.

Ankaŭ la arta programaro vespera estos altnivela, kun subĉiela inaŭguro en la apuda ĉemara Marina di Pisa, pivotanta ĉirkaŭ kanzonaro de Fabrizio de André.

Kromaj informoj: la ttt-ejo pri la Kongreso troveblas ĉe <http://tinyurl.com/yw55jz>; la kongresa kotizo estas modera (de 25 eŭroj ĝis 80 eŭroj laŭ la cirkonstancoj).

Ni tutkore atendas vin en Pisa.

Ranieri Clerici (Italio)

LA 6-A NOVJARA RENKONTIĜO

Ni invitas vin komune festi la Novan Jaron kaj partopreni en la sesa NR, ĉi-foje en Föckinghausen, malgranda kampara vilaĝo apud Meschede, oriente de la Ruhr-regiono, de la 27-a de decembro ĝis la 3-a de januaro. Refoje ni ŝatos ĝui agrablan etoson kun amikoj, konatoj kaj novuloj. Multaj denove estos el la meza generacio, kun aŭ sen kunuloj kaj infanoj; ankaŭ ĉi-foje ni sincere bonvenigos homojn pli aĝajn kaj pli junajn.

En la tri antaŭaj "Novjaraj Renkontiĝoj" (NR) ĉeestis inter 120 kaj 175 partoprenantoj; ili aĝis inter du monatoj kaj okdeko da jaroj. Partoprenis pasintfoje en Trier trideko da familioj kun entute sesdek infanoj; krome ĉeestis kvindeko da unuopuloj kaj paroj sen infanoj. Ili loĝas en ĉ. dek kvin landoj – feliĉe la plimulto venis el eksterlando kaj kreis bele internacian etoson; nur kvarono venis el Germanio.

Ni ĉefe volas pasigi kelkajn agrablajn tagojn kaj havi multan lokon por neformalaj interparoloj. Ni ĝuos promenojn, ekskursojn kaj vesperan programon kun silvestra festo, koncerto, kaj certe denove estos magia kaj (pup-)teatra prezento de Christoph Frank. Okazos prelegoj, diskutrondoj kaj diversaj kursoj; ni antaŭĝojas pri via programkontribuo! Estos aparta programo por etaj kaj grandaj infanoj, kiun gvidos Christoph Frank kun teamo da helpantoj.

Virino helpis sian edzon starigi lian komputilon, kaj en certa momento de la procedo la komputilo informis lin ke li nun devas enigi pasvorton. La edzo estis en iom amorema humuro kaj decidis provi ŝokan efikon por atentigi sian edzinon pri tio. Do, kiam la komputilo petis lin enigi la pasvorton, li evidentigis al sia edzino tion kion li enmetas per laŭtlegado de ĉiu tajpata litero: p-e-n-i-s-o. Lia edzino falis de sur seĝo pro ridado, kiam la komputilo respondas: "Pasvorto rifuzita. Ne sufiĉe longa." ***(esperanto-anekdotoj)***

La renkontiĝejo troviĝas meze de natura parko kun multaj arbaroj. Ni do havos belajn eblojn por promeni. Multaj ĉambroj disponas pri propraj duŝo kaj necesejo – vi do povos mem elekti vian luksokategorion. Estas ludoĉambro, tablotenisejo, tablofutbalo kaj multaj aliaj ludiloj. Ni certe pasigos belajn tagojn en la agrablaj salonoj de la domo kaj en la kafejo kaj vespera renkontejo.

Ĉiuj konsentas, ke plej bone oni lernas lingvon en la koncerna lando – Esperanton oni bone lernas en Esperanto-lando. Ankaŭ ĉi-foje por maksimume dek komencantoj ni ofertos iom intensan kurson en la komenco de la aranĝo; progresantoj ĝuos lingvan subtenon, kaj estos konversacia rondo. Tiel eblos dum unu renkontiĝo lerni la lingvon kaj tuj ekapliki ĝin en internacia rondo – aŭ plulerni ĝin post baza kurso kaj fari la unuajn paŝojn en tiu multnacia ĉirkaŭaĵo.

Aparte ni okupiĝos pri la lingva evoluo de la infanoj. Ili povos ekzemple partopreni diversajn kursojn kun lingva subteno; krome ili kutime ŝatas komune ludi, praktiki la lingvon dum manlaboraj rondoj kaj ĉeesti prezentadon de la konata Mazi-vidbendo. Ni esperas kaj pro antaŭaj spertoj fidas, ke tiel ni sukcesos ligi amuzon kun lingvolernado kaj refoje kontribuos al la estiĝo de gaja internacia infana rondo.

Ĉu vi interesiĝas? Tiam ĉe <http://www.esperantoland.org/nr/> plenigu la retan aliĝilon, aŭ sendu retmesaĝon al <lu@esperantoland.org>, aŭ leteron al ***EsperantoLand e. V.; Lu Wunsch-Rolshoven; Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus; 10551 Berlin Germanio.***

(landa-agado)

PREZIDANTO DE KROATIO SENDIS FLORBUKEDON AL ZAMENHOF-STRATO

Kroata Esperanto-Ligo organizis la 13-an de aprilo okaze de la Tago de memoroj pri viktimoj de Holokaŭsto kulturan programon en la zagreba Zamenhof-Strato. La programo omaĝis al la 90-a datreveno de la morto de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Reprezentanto de la Juda Komunumo "Bet Israel" el Zagrebo Jasminka Doma parolis ĝenerale pri la signifo de Holokaŭsto. Krom muziko en la centro de la programo estis voĉlegado el la libro "Zamenhof-Strato" de Roman Dobrzynski. Aktorino Vida Jerman legis Esperantan fragmenton el la libro kun tradukoj en la kroata kaj slovena. Estis prezentitaj fragmentoj el la ĉapitroj pri getto en la pola, slovaka, ĉeĥa, franca, japana... Tambure akompanis Kaja Farszky kaj Vlad Vuĉeta. Violonis infana duopo de Setsuko Ŝimizu. La tuta programo komenciĝis per solena omaĝo – meto de florobukedo de la Prezidanto de Kroatio Stjepan Mesić: la delegacio de Prezidanto metis florojn al la strattabulo kun la nomo Lazaro Ludoviko Zamenhof. Post la floromaĝo la publiko marŝis akompanata de tamburo al la provizora scenejo muntita en Zamenhof-Strato. Radio kaj tri ĵurnaloj raportis. Bela vetero allogis sesdekon da ĉeestintoj.

Spomenka Štimec (Kroatio)

NAŬ IKU-PRELEGOJ, TRI AIS-KURSOJ EN JOKOHAMO

En sia aprila kunsido la Estraro de UEA elektis la prelegojn de la Internacia

Kongresa Universitato en la Jokohama UK. La decido estis farita subaze de la profesia pritakso de la Komisiono pri IKU kunordigita de prof. Christer Kiselman. La Komisiono taksis la prelegproponojn laŭ du kriterioj: fakeco, t.e. kiom kvalifikita estas la preleganto por la temo, kaj populareco, t.e. kiom interesa kaj alloga estas la proponita temo por la kongresanoj.

En Jokohamo oni aŭdos naŭ IKU-prelegojn:
– GOTOO Hitosi: "La Vortaro por Lernantoj";
– KIMURA Gorou: "Ĉu malplimultaj lingvoj estas ekonomiaj malvenkintoj?";
– LEE Chong-Yeong: "Kapitalismo kaj Konfucea kulturo";
– Eugen MACKO: "Orienta-okcidenta dialogo laŭ Heidegger";
– SIBAYAMA Zyuniti: "Geografia Informo-Sistemo (GIS) en nia vivo";
– Jose Antonio VERGARA: "Malegalecoj je sano kaj ties sociaj determinantoj";
– Amri WANDEL: "Orienta astronomio: gasto-steloj en la Galaksia fervojo";
– ZHU En: "Esperanto kaj Bakin";
– YAMASAKI Seiko: "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto".

La resumoj de la prelegoj estas jam legeblaj en la retejo de IKU <http://uea.org/dokumentoj/iku>. La prelegoj de Sibayama, Vergara kaj Wandel estos samtempe kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj. Ĉiu el la tri kursoj konsistos el la koncerna IKU-prelego kaj du daŭrigaj prelegoj pri la sama temo, kio ebligos al la partoprenantoj pli profunde konatiĝi kun la temo.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

ESPERANTO EN "BILDARCHIV AUSTRIA"

Jam pli ol mil Esperanto-fotoj estas en "Bildarchiv Austria". La Esperanto-muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko lanĉis kunlaboron kun la "Bildarchiv Austria" kaj komencis katalogi kaj skani siajn 30.000 fotojn kaj 10.000 aliajn objektojn kun Esperanta temo. Antaŭ nelonge eniris tiun datenbankon la mila foto, la unuaj objektoj sekvos en la venontaj semajnoj. Kion tio signifas? Tio signifas, ke ekde nun tiuj skanaĵoj estas alireblaj kaj videblaj en Interreto. En la sekvaj jaroj enlaboriĝos ciuj fotoj, aliaj bildobjektoj kaj Esperantaĵoj en la posedo de la Esperantomuzeo: desegnoj, pentraĵoj, afiŝoj, poŝtkartoj, bildkartoj, poŝtmarkoj, insignoj, steloj, ŝildoj kun Esperanta surskribo...

Tiel la mondskale plej granda arkivo kun Esperanto-bildoj kaj -objektoj estas je la dispono de ĉiuj. Eblas ankaŭ deŝuti la skanaĵojn: tute senkoste en meza kvalito kaj kun ioma krompago en altega kvalito. Tio estas granda oferto ne nur por la diversaj Esperanto-revuoj, kiuj serĉas historiajn bildojn, sed ankaŭ por sciencistoj, kolektantoj kaj la simpla samideano. La priskriba lingvo de la "Bildarchiv Austria" estas la germana. Eblas serĉi per la vorto Esperanto kaj aldona vorto. Ekzemple per la serĉvortoj Esperanto kaj Wien vi ricevas bildojn de Esperanto-okazaĵoj en Vieno.

Aranĝojn oni povas trovi ankaŭ laŭ la Esperanta nomo: ekz. "universala" kondukos vin al ĉiuj fotoj de la Universalaj Kongresoj. La "Bildarchiv Austria" organizas ankaŭ malgrandajn virtualajn ekspoziciojn. Ĵus enretiĝis la unua: "Esperanto zwischen 1918 und 1938" (Esperanto inter 1918 kaj 1938) kun kompreneble

emfazo de Aŭstrio. Pro la fakto ke “Bildarchiv Austria” estas unu el la plej grandaj bild-daten-bankoj en Eŭropo, tiuj ekspozicioj pri Esperanto havos ankaŭ tre gravan varban efikon.

Alvoko: Gesamideanoj, garantiu, ke viaj historiaj Esperanto-fotoj kaj dokumentoj ne perdiĝu! Sendu ilin al la Esperantomuzeo, kiu dece kaj konvene konservos ilin por futuraj generacioj. Jen estas la adreso: *Esperantomuzeo, Nationalbibliothek Postfach 308 A-1015 Wien/Vieno, Aŭstrio.* La retadreso de “Bildarchiv Austria” estas <http://www.bildarchivaustria.at/default.aspx>. La retadreso de la Esperantomuzeo estas <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm>.

Leopold Patek (Aŭstrio)

SUKCESA KONFERENCO EN LITOVIO

La 18-19-an de majo 2007 en Kaunas okazis internacia interfaka (fizikaj sciencoj, humanismaj sciencoj kaj sociaj sciencoj) scienca konferenco FIHUSO – 2007. Ĝin organizis Kaŭnasa humanisma fakultato de Vilniusa universitato. La konferencon partoprenis 204 personoj el 33 landoj. Ĝi pasis en la pleno kaj en la kvin sekcioj (informadiko, lingvistiko kaj literaturo, interlingvistiko, ekonomiko, entreprenado). Kvankam la konferenco estis tre vasta kaj diversflanka, tamen Esperanto kaj esperantistoj en ĝi rolis sendube ĉefan rolon. Verŝajne, estas la unua fojo en la mondo, kiam en ĝenerala scienca konferenco tiom multe da atento estis dediĉita al Esperanto kaj al prelegoj en Esperanto. Minimume Esperant-informa rolo estis plenumita tre bone. En la sciencan komitaton de la konferenco eniris ses famaj esperantistoj (prof. Humphrey Tonkin, prof. Renato Corsetti, prof. Geraldo Mattos, prof. Balazs Wacha, prof. Wim Jansen, prof. Aleksandr Duliĉenko). En la listo de konferencanoj estis 21 esperantistoj el 16 landoj. Honora prezidanto de la scienca komitato de la konferenco estis Nobelpremiito prof. habil. d-ro Reinhard Selten el Germanio. Inter ĉefparolantoj de la konferenco en la plenkunsido estis kvin esperantistoj. Ĉiuj ili kaj aliaj esperantistoj faris siajn prelegojn dufoje – unufoje en la angla lingvo (aŭ la litova) kaj la alian en Esperanto en interlingvistika sekcio. Estas faritaj jenaj prelegoj:

1. Michael Cwik (Belgio). Kiamaniere intertempe atingi nediskriminacion en interetna, interkultura kaj internacia komunikado? Longdaŭra strategio por eviti lingvan diskriminacion.

2. Prof. Heiner (Aŭstrio). Pri la “nekonata lingvo” (linqua ignota) far la germana abatino Hildegardis de Bingen.

3. Prof. Carlo Minnaja kaj prof. Laura Gilda Paccagnella (Italio). Matematika vortaro por Esperanto laŭ la strukturo de Wordnet.

4. Madis Linnamägi (Estonio). Estilo – lingva projekto de Hans Koop.

5. Katarzyna Tempczyk (Pollando). Interpretado de bibliaj tekstoj laŭ privataj reve-

Avo Krukego kaj Avino Krukino promenas en la urbo. Ili preterpasas librejon, kies montrofenestro montras novan libron kun la titolo “Kiel ĝui ĉiun tagon de la resto de via vivo”. Avo Krukego: “Hm, tiu libro ŝajnas tre interesa. Kiom ĝi kostas?” Avino Krukino: “Iom multe, 25 eŭrojn.” Avo Krukego: “25 eŭrojn!? Lasu! Je nia aĝo, ĝi ne estus profita.” ***(esperanto-anekdotoj)***

lacioj – je ekzemplo de katolika eklezio de mariavitoj.

6. Prof. Aloyzas Gudavičius (Litovio). Verda koloro en la litova lingvo.

7. Aida Čižikaite (Litovio). Esprimo de tempo en Esperanto – gramatika aspekto.

8. Prof. Vera Barandovska-Frank (Germanio). Lingvistiko en interfaka perspektivo: hobiolingvistiko (ŝian prelegon prezentis Aida Čižikaite).

Ankoraŭ kelkaj esperantistaj prelegoj estis planitaj kaj enprogramitaj, sed, bedaŭrinde, la aŭtoroj pro diversaj kaŭzoj ne venis. Tamen ankaŭ iliaj prelegoj estas resumitaj en la konferenca libro.Tiuj prelegoj estas jenaj:

1. Nobelpremiito prof. habil. d-ro Reinhard Selten (Germanio). La distribuo de lingvaj spertoj kiel ludoteoria ekvilibro.

2. Ingrida Muraškovska (Latvio). Antaŭkondiĉoj por la fondiĝo de la socio de scioj el la vidpunkto de vivlonga edukado.

3. Prof. Nina Danylyuk (Ukrainio). Vortoj-simboloj en la tekstoj de ukraina folklora poezio.

4. Radojica Petrović (Serbio). Integra evoluigo de integritaj mastrumsistemoj: informadika aliro.

5. Prof. Aleksandr Melnikov (Rusio). Flugilhavaj vortoj kaj aliaj parolkliŝoj specifaj nur al la kulturo de la multnacia kvazaŭetna diaspora esperantista sociumo: genezo kaj apliko en esperantlingvaj tekstoj.

Estas eldonita 180-paĝa konferenca libro en 300 ekz. kun ĉiuj informoj kaj resumoj de la prelegoj. Karakteriza estas tio, ke nur prelegoj de esperantistoj estas resumitaj en tri lingvoj (la angla, Esperanto, la litova), ĉiuj aliaj prelegoj estas resumitaj nur en la angla. Redaktoro de la esperantlingva parto estis Aida Čižikaite, ŝi ankaŭ estis kunprezidantino de la interlingvistika sekcio.

Ĉiuj ĉefparolantoj en la konferenca libro estas prezentitaj per ampleksaj biografioj, ĉefa bibliografio kaj fotoj.

Krom la prelega programo estis renkontiĝo de la konferencanoj kun dekano de Kaŭnasa humanisma fakultato de Vilniusa universitato prof. Stasys Girdzijauskas, kiu substrekis gravecon de kunlaboro kun esperantistoj kaj esprimis deziron estonte pli vaste okupiĝi pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj studoj en la fakultato. En muzika parto de la konferenco per fluto ludis esperantistino Lidija Gomolickaite-Grudzinskaite.

Krom la sciencaj partoprenantoj en la konferenco partoprenis jenaj esperantistoj: Birute Rozenfelde kaj Ajvars Kalninŝ (Latvio), Zenonas Sabalys, Jurate Pupstaite, Povilas Jegorovas (Litovio). Parte partoprenis ankaŭ Emanuelis Dvarionas, Vida Lasiene kaj Jurate Bartaskiene (Litovio).

Ĝenerale la aranĝo estis tre sukcesa.

(esper-inform)

10-A INTERNACIA FOTOKONKURSO

Post naŭ sukcesaj konkursoj (1998–2006) la redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas al partopreno en la deka Internacia Fotokonkurso.

En la fotokonkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sende-

pende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (236039, Kaliningrad, ab. ja. 1205). La fotoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1-a de decembro 2007.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de “La Ondo de Esperanto” en 2008.
2. 25 eŭroj kaj abono de “La Ondo de Esperanto” en 2008.
3. abono de “La Ondo de Esperanto” en 2008.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de “La Ondo de Esperanto”) por la plej bona foto pri la temo “Festoj”.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en “La Ondo de Esperanto”. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31-a de decembro 2009 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formoj kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

Legu pli pri la Fotokonkursoj ĉe <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-fk.htm>.

Halina Gorecka, la sekretario

PRI HISTORIO DE BET-oj

Pro proksimiĝo de la 43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazos la 14-22-an de julio en nordlitovia urbo Šiauliai, eble estus interese iom rigardi en la historion de tiu ĉi tre grava aranĝo. Dum la sovetia periodo BET-oj por niaj esperantistoj anstataŭis Universalajn Kongresojn de Esperanto, kiujn partopreni por sovetianoj estis tre malfacile kaj foje tute neeble. Unue la aranĝo nomiĝis Ĉebaltaj Esperantistaj Tendaroj (ĈET), poste Baltiaj Esperanto-Tendaroj (BET) kaj finfine fariĝis Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET).

Necesas mencii, ke el BET-oj evoluis ankaŭ SEJT-oj (Sovetiaj Esperantistaj Junularaj Tendaroj). Estas interese, ke SEJT-oj komencis sian vivon en Litovio, tamen ne de la unua, sed ekde komenco de la 9-a, ĉar en 1967 BET-9 okazis en la ĉefurbo de Litovio Vilnius kaj samtempe gejunuloj aranĝis la junularan tendaron en Kaltanenai (Litovio), kiu ricevis la titolon SEJT-9.

Dum la jaroj BET-oj kreskis al tutsovetia aranĝo, kaj post sendependiĝo de Baltiaj landoj ĝi jam fariĝis vere internacia kaj kreskis al preskaŭ tuteŭropa esperantista aranĝo. BET-oj ankaŭ parte anstataŭis baltiajn Esperanto-asociojn, kiujn ne eblis fondi en la sovetia periodo, do BET-oj servis kiel ia konstanta organiza kaj kunlabora formo por esperantistoj de tiutempaj baltiaj respublikoj de Sovetunio. Fakte BET-oj komencis organizitan Esperanto-movadon en baltiaj landoj dum sovetia periodo.

Sube estas prezentata tabelo de BET-oj, preparita de eksredaktoro de “Litova stelo” Petras Čeliauskas. Ĝi jam antaŭ kelkaj jaroj aperis en “Litova stelo” kaj nun reaperas aktualigita kaj ĝisdatigita per ciferoj de lastjaraj BET-oj. Kiel eblas vidi, BET-oj en Litovio kutime estis la plej multnombraj. BET-oj ne okazis en 1973 kaj dum 1979-1982, ĉar tiutempaj sovetiaj instancoj malpermesis organizi la aranĝon – do dufoje en tiuj jaroj BET ne okazis en Litovio – nome en 1973 kaj en 1979. En 1992 en Litovio BET ne okazis, ĉar tiujare litovaj esperantistoj aranĝis la 65-an kongreson de SAT, tamen la kongreso de SAT enhavis ĉiujn ĉefajn programerojn de BET-oj, tial eblas konstati, ke la tradicio ne estis rompita. Espereble, pli detalan historion de BET-oj rakontos organizintoj de la unuaj BET-oj.

Povilas Jegorovas (Litovio)

TABELO DE BET-oj

ĈET-1, 01 – 10.08.1959, Baltezers, Latvio (48 partoprenintoj)
ĈET-2, 01 – 10.08.1960, Kääriku,Estonio (107)
ĈET-3, 01 – 10.08.1961, Molėtai, Litovio (204)
ĈET-4, 01 – 10.08.1962, Drabeši, Latvio (238)
BET-5, 04 – 11.08.1963, Värska, Estonio (288)
BET-6, 01 – 10.08.1964, Veisiejai, Litovio (153)
BET-7, 30.07 – 08.08.1965, Saulaine, Latvio (171)
BET-8, 05 – 15.07.1966, Pärnu, Estonio (117)
BET-9, 01 – 10.08.1967, Vilnius, Litovio (337)
BET-10, 27.07 – 05.08.1968, Ruba, Latvio (194)
BET-11, 10 – 16.08.1969, Viljandi, Estonio (400)
BET-12, 01 – 10.08.1970, Kretinga, Litovio (316)
BET-13, 06 – 15.08.1971, Smiltene, Latvio (189)
BET-14, 01 – 10.08.1972, Häädemeeste, Estonio 170

BET-15, 02 – 04.08.1974, Rīga, Latvio (102)
BET-16, 25.07 – 03.08.1975, Helme, Estonio (222)
BET-17, 30.07 – 10.08.1976, Viekšniai, Litovio (241)
BET-18, 23 – 31.07.1977, Rēzekne, Latvio (223)
BET-19, 15 – 23.07.1978, Kehra, Estonio (174)

BET-20, 01 – 10.07.1983, Noreikiškės, Litovio (358)
BET-21, 06 – 15.07.1984, Kuldīga, Latvio (299)
BET-22, 03 – 10.07.1985, Kose, Estonio (450)
BET-23, 10 – 19.07.1986, Smalininkai, Litovio (472)
BET-24, 12 – 19.07.1987, Saulaine, Latvio (406)
BET-25, 24 – 31.07.1988, Tallinn, Estonio (350)
BET-26, 12 – 20.08.1989, Noreikiškės, Litovio (608)
BEK-27, 10 – 19.07.1990, Jelgava, Latvio (435)
BET-28, 08 – 15.07.1991, Tartu, Estonio (422)
SAT-65, 05 – 15.08.1992, Noreikiškės, Litovio (452,
el ekssovetiaj respublikoj 296)

BET-29, 09 – 17.07.1993, Priekuli, Latvio (50)
BET-30, 23 – 30.07.1994, Pärnu, Estonio (100)
BET-31, 08 – 16.07.1995, Girionys, Litovio (203)
BET-32, 02 – 10.08.1996, Jūrmala, Latvio (208)
BET-33, 03 – 09.08.1997, Haapsalu, Estonio (162)
BET-34, 17 – 24.07.1998, Veisiejai, Litovio (253)
BET-35, 18 – 24.07.1999, Liepāja, Latvio (163)
BET-36, 03 – 09.07.2000, Tallinn, Estonio (201)
BET-37, 07 – 15.07.2001, Noreikiškės, Litovio (303)
BET-38, 07 – 14.07.2002, Rīga, Latvio (182)
BET-39, 10 – 14.08.2003, Tartu, Estonio (76)
BET-40, 11 – 17.07.2004, Birštonas, Litovio (257)
BET-41, 15 – 21.07.2005, Rīga, Latvio (150)
BET-42, 04 – 08.07.2006, Kuresaare, Estonio (137)
BET-43, 14 – 22.07.2007, Šiauliai, Litovio

AKADEMIA KONSULTEJO

Akademio de Esperanto en 1999 starigis komisionon ***Konsultejo de la Akademio***, al kiu povas turni sin ĉiu Esperanto-uzanto per difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon. Demandojn pri vortfarado (novaj nocioj, terminoj) la komisiono povas respondi relative rapide; ĉe komplikaj gramatikaj problemoj kutime daŭras pli longe. *La respondoj ne estas decidoj de la Akademio de Esperanto, sed rekomendoj de la konsult-komisiono*; tamen la Akademio esperas ke utilas tiu ĉi rapida servo, pri kies manko ofte oni plendis.

Kiel demandi al la Konsultejo? Vi povas: uzi la demandoformularon (preferinde) ĉe la adreso <http://akademio-de-esperanto.org/konsultejo/demandi.html>, aŭ sendi retpoŝton al <konsultejo@akademio-de-esperanto.org>, aŭ sendi leteron al la provizora prizorganto de la Konsultejo: *Boris Kolker, 2487 North Taylor Rd, Apt 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono*. La Konsultejo ne povas akcepti demandojn per telefono.

Klare formulu la demandojn kaj demandu konkrete. Bonvolu indiki ĉe urĝaj demandoj, ĝis kiam vi esperas ricevi respondon. Rapidan respondon ni povas garantii nur al demandintoj, kiuj disponas pri ret-adreso aŭ telefakso.

La komisiono petas nepre ne sendi bagatelajn demandojn, kiujn povas respondi ĉiu sperta esperantisto, serĉante en vortaroj kaj aliaj konsult-libroj.

REGo planas aperigi la plej interesan demandojn kaj respondojn de la Konsultejo. Jen estas la unuaj ekzemploj, afable senditaj al REGo de la prizorganto de la Konsultejo Boris Kolker.

DEMANDO *de Aleksandro Galkin (Rusio/Germanio)*

Ĉu oni rajtas uzi la prepozicion "je" en la senco "precize en tiu dato", kiel oni faras tion por horoj?

RESPONDO

Nenio malhelpas uzi la prepozicion “je” por datoj, kvankam oni faras tion relative malofte; ekzemple: “Mi venos je merkredo”, “Mi venos je la 2-a de februaro”. Pli ofte oni uzas por datoj prepozicion kun konkreta signifo (ekzemple, “en”): “Mi venos en merkredo”, “Mi venos en la 2-a de februaro”. Kaj eĉ pli ofte oni uzas por datoj la akuzativon: “Mi venos merkredon”, “Mi venos la 2-an de februaro”. Resume: ĉiuj tri rimedoj por indiki daton estas permeseblaj.

Mallongigitaj esprimoj kiel “je la tria” (sen eksplicita indiko, ĉu temas pri tago aŭ horo), tamen, kutime uziĝas nur pri horo (“je la tria” = “je la tria horo”). Tial oni evitu tian mallongigitan dirmanieron kun “je”, se temas pri tago de monato.

DEMANDO *de Emerson Werneck (Brazilo)*

Kiu estas la leksika fono de Esperanto? Ĉu ĝin konsistigas la latina kaj latinidaj lingvoj aŭ ankaŭ ĝermanaj, slavaj kaj la greka lingvoj?

RESPONDO

La plej uzataj vortoradikoj eniris en Esperanton ne tiom el apartaj lingvoj, kiom el la eŭropa internacia vortostoko. Tiu internacia vortostoko manifestiĝas por Esperanto kiel vortoradikoj, komunaj al la ĉefaj fontoj de Esperanto, kiuj estas (laŭ malkreskanta grado) la lingvoj franca, angla, germana kaj rusa. Tio signifas, ke la plej uzataj vortoradikoj eniris en Esperanton, se ili estis rekoneblaj por portantoj de kiel eble plej multaj el tiuj kvar lingvoj. Ĉar la angla lingvo kaj, en malpliaj gradoj, la rusa kaj germana lingvoj enhavas amason da vortoj (oftaj kaj maloftaj) latin(id)devenaj, la vortostoko de Esperanto aspektas en sia plej uzata parto (laŭ malkreskanta grado) kiel latina kaj latinida, ĝermana kaj slava. Apartaj vortoradikoj (ĉefe por signi lokajn realaĵojn) eniras en Esperanton el multaj aliaj eŭropaj kaj ne-eŭropaj lingvoj. La Esperanta vortoradiko plej ofte estas mezigita formo de vortoj-modeloj, proksimaj laŭ formo kaj semantiko, el la lingvofontoj de Esperanto.

DEMANDO *de Hélène Ménissier (Francio)*

Tro multaj Esperantaj vortoj venas rekte el la franca lingvo. Mi scias, ke tio estas historia problemo; sed, laŭ mi, nepras korekti tion.

RESPONDO

La Esperanta vortostoko malpli similas al la franca ol franclingvanoj ofte supozas. Estas vero, ke ĝi konsistas grandparte el latin(id)aj vortoradikoj, ĉar ili estas komunaj al la ĉefaj fontoj de Esperanto (la lingvoj franca, angla, germana kaj rusa). Tamen ofte latin(id)a radiko eniras en Esperanton en la formo, kiun ĝi akiris en la rusa lingvo (sed ne en la franca aŭ angla). La Esperanta vortostoko entenas ankaŭ konsiderindan kvanton da oftaj vortoradikoj ĝermanaj kaj slavaj. Ĉar lastatempe multaj diversfakaj anglaj vortoj penetras en aliajn lingvojn, parto el ili fariĝas internaciaj kaj ekuziĝas ankaŭ en Esperanto. Arbitre ŝanĝi la ekzistantan vortostokon de la vivanta lingvo estas neeble. Sed kun disvastiĝo de Esperanto ekster Eŭropo, ĝi enprenos vortojn ankaŭ el ekstereŭropaj lingvoj. Per plena eluzo de la Esperanta

vortfarado oni povas limigi la rekte prenitajn vortojn.

Cetere, tiu ĉi demando ne konformas al la celoj de la Konsultejo, kiu donu konsilojn pri tio, kiel uzi la lingvon, kiel esprimi tion aŭ jenon, kiel diri ion en ĝusta maniero. Por ĝeneralaj demandoj oni uzu la liston AdE-diskuto: <http://groups.yahoo.com/group/AdE-diskuto/>, al kiu oni povas aliĝi per sendo de malplena retletero laŭ la adreso: <AdE-diskuto-subscribe@yahoogroups.com>.

DEMANDO *de Vytautas Ŝilas (Litovio)*

Ĉe kunmetitaj vortoj, kutime, la ĉefa estas la dua komponanto (ekz., la radiko "pren" en la kunmetaĵo "pruntepreni"). PIV ĉiujn, kiuj unteresiĝas pri vortuzo de "partopreni" el la vortnesto de la transitiva "preni" sendas al la vortnesto "parto". Tie ni ekscias, ke la kunmetaĵo "partopreni" estas netransitiva. PIV prezentas sufiĉe klaran ekzemplon: "partopreni en la laboroj de ambaŭ komitatoj". Tamen en la praktiko oni uzas "partopreni en kongreso" kaj "partopreni kongreson". Kiu uzo estas (pli) ĝusta?

RESPONDO

Ĉar "partopreni" origine signifis "preni (sian) parton", "partopreni en kongreso" estas certe ĝusta esprimo. En okazoj, kiam oni hezitas, kiun prepozicion uzi, oni rajtas uzi malpli konkretan prepozicion "je" aŭ akuzativon, se tio ne ŝanĝas la signifon de la esprimo, do ankaŭ "partopreni kongreson" estas ĝusta esprimo.

DEMANDO *de Mark Haskell (Usono)*

En la angla lingvo "intelligence" povas havi la signifon de "informo" aŭ "sciigo". Do, kiun Esperantan vorton oni uzu por la esprimo "military intelligence collection" aŭ "a matter of national intelligence" ktp?

RESPONDO

La angla vorto "intelligence" havas plurajn signifojn kaj ne estas tradukebla per unusola Esperanta vorto. Ankaŭ la du esprimoj, pri kiuj vi demandas, povas havi diversajn tradukojn depende de kunteksto kaj stilo. Ekzemple, jenaj tradukoj ŝajnas adekvataj: 1. "military intelligence collection" – "armea kolektado de (konfidencaj) informoj/sciaĵoj"; aŭ mallonge "armea informokolektado". 2. "a matter of national intelligence" – "afero rilatanta al nacia/registara/nearmea kolektado de (konfidencaj) informoj/sciaĵoj"; aŭ mallonge "nearmea informokolektado"; eble eĉ "afero rilatanta al nacia sekureco".

la verda KoRo

kultura revuo

"LA MASTRO DE L' RINGOJ" REAPEROS

La 15-an de aprilo Jascha Hoffmann, kunlaboranto de "New York Times Book Review", anoncis en la rubriko *Comparative Literature*, ke la ruslanda eldonejo "Sezonoj" en 2007 reeldonos la Esperantan version de "The Lord of the Rings" de Tolkien en la traduko de skota poeto William Auld.

Ĝi elĉerpiĝis baldaŭ post la eldono, kaj ĉi tiu plej populara beletra libro de la 20-a jarcento (laŭ BBC) denove aperos en nia libromerkato. Ĉi tio iĝis ebla danke al la prunto de la fondaĵo FAME. Zorga kontrolado fare de kelkaj provlegantoj ebligis elsarki plurajn erarojn, kiuj enŝteliĝis en la unuan eldonon. "La Mastro de l' Ringoj" estos lanĉita en BET-43 en Šiauliai, ĉar ĝi estos presita en Litovio kun kovriloj de Kaŭna libroartisto Vladimiras Beresniovas.

La projekt-gvidanto, Aleksander Korĵenkov, poste prezentos la libron en la aranĝoj "Arta Lumo" (Finnlando, julio), "Sukcena Ondo" (Kaliningrad, aŭgusto) kaj "ARKONES" (Poznań, septembro). En ĉiu tiuj prezentoj oni povos aĉeti la libron kontraŭ rabatita prezo, kaj en la postkongresa periodo ĝi estos mendebla ĉe la libroservoj de UEA kaj ELNA kaj ĉe aliaj grandaj libroservoj. Instigu vian libroservon al mendo.

(esperanto-rus-informoj)

JUBILEA EKSPOZICIO PRI SAMARKANDO

La 17-an de majo, honore al la Internacia Tago de Muzeoj, en la Samarkanda Ŝtata Muzeo ni inaŭguris la novan internacian ekspozicion "La Mondo Gratulas Samarkandon", dediĉe al la 2750-jara jubileo de nia hejmurbo. La inaŭguran ceremonion partoprenis kaj salutparolis ankaŭ esperantistoj el Svislando kaj Francio. La inaŭguro estis filmita kaj kelkfoje montrita de la televido.

En aŭgusto ni planas pliampleksigi la ekspozicion per la nova sekcio "Samarkando en ĉiuj kontinentoj". Refoje dankon por via kunlaboro! Ri-

La edzino de la rabeno revenas el la publika banejo tute indigna, kaj eĉ sen demeti la mantelon sin ĵetas sur la edzon: "Kia speco de rabeno estas vi? Kiun vi elektis kiel gardiston en la banejo?" Ŝi daŭrigas: "Maldeca kaj aroganta senrespektulo! Li enirigis en la banejon la publikan putinon antaŭ mi; antaŭ mi, la rabenedzino, ĉu vi komprenas tion?" Sen levi siajn okulojn for de la Sanktaj Skriboj, la rabeno murmuris: "Li bone kondutis, karulino... vere, bone farita!" Konsternita, la edzino ekkriis: "Kio? Bone farita? Ĉu vi freneziĝis?" "Sed jes, karulino, ĉu vi ne komprenas? La tuta urbo atendis ŝin, la putinon! Dume vin atendas nur tiu ĉi mizera rabeno!" ***(juda anekdoto de Josef Shemer)***

gardu la ruslingvan materialon ĵus aperintan ĉe la tutlanda Interret-portalo: <http://culture.uzreport.com/news.cgi?lan=r&id=32136>.

Ĝis revido en ...la 2750-jara Samarkando!

Anatoli Ionesov, Direktoro de Muzeo de Paco kaj Solidaro

LITERATURA KONKURSO "LIRO-2007"

"La Ondo de Esperanto" denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso "Liro".

"Liro-2007" havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo.
2. Originala poezio.
3. Traduka poezio: Poemoj de Saŝa Ĉjornij (Aleksandr Glikberg), okaze de lia 75-a mortodato.
4. Traduka prozo (el la rusa lingvo): "Аптекарша" de Anton Ĉeĥov.
5. Traduka prozo (el la angla): "Eveline" de James Joyce (el la novelaro "Dubliners").

En la branĉoj 1–3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de "Liro", Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 15-a de oktobro 2007.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, la aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso <sezonoj@yahoo.com>. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario kontraŭ afrankita koverto aŭ internacia respondkupono. La elektronikaj tekstoj estas elŝuteblaj ĉe <http://esperanto.org/ondo/liro2007.htm>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2007. La organizanto ĝis la 1-a de januaro 2010 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en "La Ondo de Esperanto" kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Legu pli pri "Liro" ĉe <http://esperanto.org/ondo/ind-liro.htm>. Sukcesojn!

Halina Gorecka, sekretario de Liro-2007

APERIS GRANDA GERMANA-ESPERANTO VORTARO

Ĵus antaŭ la 84-a Germana E-Kongreso la Granda Vortaro Germana-Esperanto de Erich-Dieter Krause aperis en la eldonejo "Helmut Buske" (Hamburg). Vere leksikografia kaj eldoneja mejloŝtono, kun 1679 paĝoj kaj pli ol 160.000 artikolvortoj, ĝi estas la plej ampleksa dulingva vortaro de Esperanto en la mondo.

La Granda Vortaro enhavas la tutan vortaron de la ĉiutaga vivo kun multaj ekzemploj de vortapliko. Krome oni trovos en ĝi faklingvajn esprimojn el ĉiuj kampoj. Ĉe botanikaj, zoologiaj kaj medicinaj fakvortoj, la respektivaj latinaj vortoj ankaŭ estas indikataj. La lingvouzo en Aŭstrio kaj Svislando, kiel ankaŭ aliaj

regionismaj estas konsiderataj, sammaniere kiel geografiaj nomoj, personaj nomoj kaj mallongigoj.

La unuaj reagoj de Esperanto-fakuloj estas entuziasmaj: "Per tiu verko denove estas pruvite, ke Esperanto estas establita kiel internacia kulturlingvo. Sur scienca fundo la alta uzebleco de Esperanto en la tutmonda komunikado estas klare montrita."

Malgaje plendis Kohen al sia najbaro:
– Mi estas vera malfeliĉulo! Mia vendejo estis jam trifoje elŝtelita, kaj verŝajne estis ĉiam la sama ŝtelisto.
– Ne miregu, amiko, – respondis la najbaro. – Vi ja havas en la montrofenestro surskribon: ***Se vi estas kontenta, venu denove***. Do, akuzu nur vin mem! (juda anekdoto de Josef Shemer)

La vortaro estis kompilata dum pli ol tridekjara leksikologia kolektado fare de la konata lingvisto kaj leksikologo Erich-Dieter Krause, kiu ankaŭ publikigis la Vortaron Esperanto-Germanan en 1999.

Bibliografiaj informoj: ***Erich-Dieter Krause. Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto*** *– Helmut Buske Verlag, Hamburg 2007 – XVII, 1.679 Seiten. 978-3-87548-466-3.*

(Gazetara Komuniko de la Germana E-Asocio)

La 11-an de junio 1937 dum la hispana civila milito ĉe la urbo Ueska pereis granda hungara internaciisto kaj verkisto Mate Zalka. Mi tradukis la versaĵon de K.Simonov, dediĉitan al li. Ĉi traduko estis publikigita en la revuo "Internaciisto".

Marija Prilepskaja (Samara)

Konstantin Simonov

Generalo

Memore al Mate Zalka

En montoj ĉi-nokte ne varmas.
Tre laca pro tag-esplorad'
Li sidas ĉe flava fajreto,
Li pensas – eterna soldat'.

La kruĉo kun kafo brubolas,
Dormegas la militistar',
Ĉiele de laŭr' aragona
Susuras sen ĉes' foliar'.

Sed ŝajnas, li aŭdas ne laŭron –
Aŭdiĝas susur' de tili',
La arbo amata kaj kara
De lia hungara patri'.

Li lasis delonge Patrujon –
Lin kaptis militmuelej',
Li trovis sin en Siberio,
En fora militkoncentrej'.

Fariĝis li jam komunisto,

Batalis por ruĝa Rusi',
Sed jen okcidenten hungarojn
La trajn' tiris al Hungari'.
    Li en Budapeŝton revenis.
    Por kio? Por nova luktad'?
    Por plori ? Por dentojn kunpremi
    Kaj ree – fremdlanden kurad'?
Ĉi venon li eĉ ne atentas
Gardante Patrion en kor',
Li scias ke devas reveni
Al hejmo por ĉiam el for'.
    Li daŭras tutmonde batali:
    En Hamburg lin kovris bombad',
    Lin konis Ĉapej', en Ĥarama
    Pri li estis la parolad'.
Li lasis delonge Patrujon,
Sed estis dum vojoj en kor'
Hungaraj ĉielo kaj tero,
Pri lando lasita memor'.
    La ruĝa standardo hungara
    Prilumas lin dum batalad'.
    Li por Hungario luktadas –
    Ne gravas la lok' de luktad'.
Al mi oni diris en Moskvo
Ke dum ĉe Ueska batal'
Pro de Germani' obusero
Pereis en kamp' general'.
    Sed tamen mi kredas neniun:
    Batal' – lia devo kaj sort',
    Kaj en Budapeŝton reveni
    Li devas ja antaŭ la mort'.
Kaj dum la hispanan ĉielon'
Trapikas germana birdar',
Ne kredu: li vivas. Leteroj
Mensogas, ne veras famar'.
    Troviĝas li nun – ĉe Ueska,
    Dormegas la militistar',
    Ĉiele de laŭr' aragona
    Susuras sen ĉes' foliar'.
Sed ŝajnas, li aŭdas ne laŭron –
Aŭdiĝas susur' de tili',
La arbo amata kaj kara
De lia hungara patri'.

Okupante min, krom tradukado, verkado de rakontoj, poemetoj k.s., ankaŭ pri serioza laboro super historia romano, mi certiĝis, ke magra estas la materialo, kiun mi kolektis ĝis nun. Ke serĉado de bezonata faktaro okupos eble pliajn du-tri jarojn. Ke mi ne rajtas elfantazii tion, kion oni ĝenerale ne rajtas iel kripligi. Kaj mi ekrevis pri ripozo. La ripozo iĝis por mi ekverko de alia granda aĵo, faktoj por kiu nestas en mia memoro, ĉar mi estas travivinta ĉiujn tiujn eventojn. Temas pri la horora, impertinenta privatigo, okazinta en Rusio antaŭ iom pli ol dek jaroj. Laŭ mia scio, tiu ĉi ago iĝis pli aŭ malpli dolora tragedio por plejmulto de rusiaj entreprenoj, nomitaj "popola" aŭ "ŝtata" posedaĵo. La onta romano havas provizoran titolon "La urbo Goblinsk" kaj verkatas sufiĉe aktive por esti finfarita eble en 2007. Certe, la plej gravaj eventoj iel-tiel estis okazintaj reale en Tiĥvin, la urbeto, kie mi loĝas. Por la legantoj de REGo mi prezentas unu ĉapitron de la estonta romano. ***(Mikaelo Bronŝtejn)***

Mikaelo Bronŝtejn

La Urbo Goblinsk

18.02.1993

Tia frosto estis ne tre serioza por finfebruaro. Nur dek du gradoj. Neĝis abunde dum la tuta vintro, do kvindek metroj tra arbareton al la lago Zaluŝĉik estis ŝvitigaj – ĉe ĉiu vica paŝo kruro ĝislumbe mergiĝis en la neĝon. Tamen la laga glacio estis preskaŭ pura. Ventokirloj regulaj akurate forblovadis la neĝon de sur la oblonga glaciiĝinta akvosurfaco arbaren, kaj nun la bluverda glacio, kaptanta malvarmajn februarajn sunradiojn, jen kaj jen respegulis etajn ĉielarkojn.

Ili havis horon, eble horon kaj duonon, do necesis eklabori tuj. Aleksej Ivanoviĉ, spertulo pri vintra fiŝkaptado, diskrure faris dudek kvin paŝojn antaŭen laŭ la glacio, malpakis helicborilon kaj komencis bori la unuan truon. Lazar rapide purigis kvadratan placeton ĉeborde, fordonis la grandan ŝovelilon al Maksim, formis el sekaj branĉoj, kolektitaj apude, dignan ekfajrujon kaj ekpaŝis kun hakilo por trovi kelkajn sekajn trunkojn. Seniĉkin, la ŝoforo, apogis sin kontraŭ abia stumpo, pli alta ol ordinare lasataj post arbosego, kaj ekfumis.

– Seniĉkin, kanajlo, – diris Maksim sen troa espero, – helpu min la tranĉeon fosi. Ja egale vi devas reveni al la aŭto…

– Enĉerke mi vidis vian tranĉeon, – pace elgrumblis Seniĉkin. – Ĉestirila, do sterila. Vodkon trinki mi ne rajtas, saŭnon viziti – same. Fosu tiu, kiu drinkos… Eĥ! Veturu mi al la hotelo… – li profunde enspiris cigaredfumon, montrante plenan memkontenton kaj absolutan indiferenton al ia ajn laboro krom stirado, vestis pugnogantojn kaj barakte ektrenis sin reen al sia buseto.

– Movu vin pli aktive! – kriis Maksim al li. – Per la dorso, per ŝultroj – unu du, unu du! Almenaŭ tiel mi havos malpli da laboro!.. Ĥa-ĥa-ĥa! Dankon!

– Iru ci… al ŝpinaco! – respondis Seniĉkin. – Subulojn viajn igu moviĝi! Ĉe-

feto!..

Li elrampis survojen al la aŭto, ŝaltis motoron kaj malaperis trans vojturnon, lasinte por Maksim spuron de venena fumo.

Do la tranĉeo, farenda enneĝe de la laga bordo ĝis la vojo por ke gastoj atingu la bordon sen ŝviti, restis por Maksim, intertempe demetinta vatjakon. Li ĵetis sopiran rigardon al la ŝovelilo kaj ekfosis impete, disĵetante la neĝon dekstren kaj malen. Metro post metro li konkeris profundan neĝtavolon, ĉe tio pli kaj pli kreskis en li protesta ondo. Ja jes – kun iom da peno, sed tute certe li povus malobei la peton de Sigaev. Imiti malsanon. Forveturi al Peterburgo, havante kiel pretekston ian konsiderindan kaŭzon, ekzemple malbonfarton de la geonkloj… Diablo mordu tiun Viĉjon Sigaev! Sed ne tro forte, ĉar Viĉjo estas amiko jam dum du jardekoj, eĉ pli. Ĝuste pro tio Maksim konsentis prizorgi la francojn, sed ne pro tio, ke Viĉjo Sigaev estis lia estro, direktoro de la fabriko…

Ŝvito fluis de sur la frunto laŭ la vangoj, miksiĝanta kun larmoj – tiu fajro, kiun Lazar sukcesis intertempe produkti el malsekaj branĉoj, donis tro da fumo, kaj la aĉan fumon venteto kvazaŭ intence pelis ĝuste en la tranĉeon, ĝuste en la okulojn de Maksim!.. Eksterplanan delegacion, venintan el la ĝemelurbo, la urbodomo akceptas kun kutima varmo, diris al li Viĉjo Sigaev. Akceptas vendrede. Sed pro la subita veno de tiuj francoj mankas io por sabata programo, do mem la urbestro Petrovskij petis helpon de la fabriko "Rusoplast". Ĉu Viĉjo povis rifuzi? – Jes, Maksim konsentis, neniel povis. Sed Lazar kun Aleksej Ivanoviĉ tute bone faros ĉion duope – kaj fiŝkaptadon, kaj ŝaŝlikumadon, kaj ankaŭ saŭnadon vesperan. Por kio bezonatas plia vodkodrinkanto? – Por kio, por kio, – replikis Viĉjo, – ne ŝajnigu vin stulta. Por via franca! – Tamen ja ili ne povis veni sen tradukisto! – plu obstinis Maksim. – Ili venis kun knabinoj, – respondis Viĉjo, – kun la knabinoj, kiuj iom balbutas france. Nur iom… Cetere, du "otguloj"[1] por vi ne malutilos, kiam vi denove havos la intencon foriri al viaj esperantistoj. – Mi eĉ sen tio havas dekon da "otguloj"! – Do vi havos dek du. Ĉu konsent'? – Nu bone… Konsent', – diris Maksim. – Ĉu vi mem venos? – Ne, – diris Viĉjo, – mia edzino festos naskiĝtagon… krome, la gastoj estas negravaj por la fabriko – iaj pentristoj… Do havu agrablan tempon!

La tranĉeo estis preta. Intertempe dum la ŝovelado Maksim aŭdis feliĉan ekjelpon de Aleksej Ivanoviĉ, kaptinta la unuan perĉon, kaj invitan krion de Lazar por solena prifesto de la kaptaĵo. Li ignoris tion, kaj nur post kelkaj minutoj, finfarinta la taskon, kun ŝovelilo surŝultre proksimiĝis al la fajrujo.

Tie lertulo Lazar jam preparis ĉion necesan. Kvar branĉoforkoj firme staris ambaŭflanke de la fajrokavo, formiĝinta post degelo de la neĝo. Sur ĉiun forkoparon estis metita rekta branĉo. En la kavo inkandeske brulis lignokarboj, kaj super ili, sur la du rektaj branĉoj estis fumigata deko da ŝaŝlikoj, super kiuj disfluis apetita, neripeteble vianda odoro. Nigrahara, ciganaspekta sportemulo Lazar demetis ĉapon kaj vatjakon. Protektante siajn brunajn okulojn per maldekstra mano kontraŭ larmiga fumo, per la dekstra li sorĉetadis ĉe la ŝaŝlikoj, turnante la ŝampurojn ne laŭ-

[1] Otgulo – kompensa ripoztago, donata pro antaŭa ekstra laboro.

vice, sed laŭ la ordo, konata nur al li mem. Malalta, minca Aleksej Ivanoviĉ ŝajnis nano, starante apud Lazar. La naztruoj de tiu nano senĉese moviĝis – kun elokventa ĝuego li ensorbadis la ŝaŝlikodoron. Centgramaj glasetoj, malfermita vodko, tranĉita pano kaj vazo kun peklitaj kukumoj staris jam sur faldotableto.

– Nu, finfine! – ektumultis Aleksej Ivanoviĉ. – Maksim, animo mia postulas cent gramojn, sed vi ne rapidas! Venu, venu... – Per tremetantaj manoj li prenis glaseton, plenigis ĝisrande kaj akurate donis al Maksim, poste plenigis la glasetojn por Lazar kaj por si. – Vi, knaboj, havas varmigan laboron, sed min varmigu la glaseto. Estu ni!

– Ne diru, Aleksej Ivanoviĉ, – raŭke elspiris Lazar, fortrinkinte vodkon kaj mallerte eligante per du fingregoj kukumeton el la vazo. – Unu glaseto por vi – kiel ŝrotero por elefanto – nur incitilo. Ni ja scias, ke vi kapablas eltrinki eĉ pli ol mi.

– Eble jes, eble ne… – Aleksej Ivanoviĉ duonfermis la ruzajn okuletojn. – Laŭ cirkonstancoj. Nu, prenu ni plian glaseton, knaboj!

– Ne hastu, – Maksim viŝis la nazon, kiun trafis fulgo. – Jam Seniĉkin signalas, do ni trinku la duan jam kun la gastoj.

Efektive de la vojo jam aŭdiĝis motorbruo kaj signalado, poste – proksimiĝanta franclingva parolado kaj ekridoj de virinoj. Kvinpersona kompanio paŝis al la lago unu post la alia laŭ mallarĝa tranĉeo. Du francoj – Dominik, krispulo pli ol mezaĝa kun ekgriza barbeto kaj Kristian, pli juna, preskaŭ blonda, longanaza. La nomojn Maksim sciis de Viĉjo, do li tuj salutis:

– *Bonjour, Dominique! Bonjour, Christian! Venez chez nous – tout est pret deja!*[1]

– *Oh, bonjour, monsieur!* – respondis Dominik. – *Froid de loup! Tu es Maxime? Oui?! Enchante!*[2] – Li parolis rapide, samtempe malvolvante orelprotektilojn de sia leĝera kvadratita kepo, certe malserioza kaj senutila por la rusa frosto.

Kristian estis ne tiom parolema, ĉar okupata pri la fraŭlinjoj. Aperinte el la tranĉeo li nur premis la manon de Maksim kaj turnis sin por kavalirece asisti aperon de ridanta brunhara diketulino en vulpa pelto kaj sekvanta ŝin pli alta kaj belstatura rufa simpatiulinjo, kies rido estis kaŝita en ŝiaj grizaj okuloj. Fine aperis Seniĉkin, tutaspekte emfazanta sian flankecon kaj malkontenton.

– Hej, knaboj! – laŭte diris la diketa ulinjo. – Kaj eĉ simpatiaj – kia domaĝo! – Ŝi elokvente montris perokule la francojn. – Nu, tamen ni konatiĝu: mi estas Ljuda, ŝi estas Nataŝa.

– Maksim, – diris Maksim, okulvorante Nataŝan.

– Ni jam aŭdis… – tiu sen intereso ridetis responde. Ŝi rigardis al Lazar.

– Mi estas Lazar Isakoviĉ, – Lazar elbuŝigis. – Por konatoj – Lazar.

– Kiel interese! – pepis Ljuda. – Sed mi tuj imagis, ke vi estas cigano…

– Do, nun vi scias, ke mi ne estas, – rebatis Lazar.

La francoj silente ridetis, gapante al la interkonatiĝo. Kristian, forgesinte pri kavalireco, frotis per ambaŭ manoj siajn ruĝajn orelojn.

---

[1] Saluton, Dominik! Saluton, Kristian! Venu al ni – jam ĉio pretas! *(fr.)*

[2] Ho, saluton, sinjoro! Terura frosto! Vi estas Maksim? Ĉu? Tre agrable! *(fr.)*

– Sinjorinoj, ne preteratentu! – aŭdiĝis ruza voĉo de ĉe la fajrujo. – Mi estas Aleksej Ivanoviĉ, la ĉefa fiŝkaptanto! Iam ankaŭ pri kaptado de fraŭlinoj mi lertis, kaj eĉ nun mi ankoraŭ kapablas – ne malpli ol tiuj du buboj! Ja vi scias: maljuna ĉevalo sulkon ne difektas…

– Jes, sed plugas ne profunde! – respondis Nataŝa. – Do, Aleksej Ivanoviĉ, montru vian predon, kaj ni vidos vian kapablon.

– Ne bonas la tempo por fiŝkaptado, – Aleksej Ivanoviĉ diris malpli gaje. – Dormas fiŝoj en februaro... Tamen iru al la kaptiloj – estas io por montri al la gastoj.

Ĉe la truo englacia kuŝis du kompatindaj perĉetoj. Intertempe ili kurbiĝis konvulsie kaj sukcesis plene glaciiĝi. Dominik demetis ganton de sur la dekstra mano kaj singarde prenis la fiŝeton per du fingroj.

– *Matiere plastique?*[1] – li demandis, montrante ekmiron.

Aleksej Ivanoviĉ komprenis la lastan vorton. Li eksnufis ofendite kaj ekjelpetis:

– Kial plastik', kia plastik'?! Natura fiŝo, diru al li, Maksim! Diru: se ili estus venontaj en marto, mi montrus al ili "plastik'"! Mi eltiradus perĉojn pli rapide ol ili kapablus kalkuli!

– Ni kredas, kredas, Aleksej Ivanoviĉ, – Ljuda diris paceme. – Sed eble ni ŝanĝu la okupon – vidu, ni tute frostigis la gastojn.

– Ha, tio estas riparebla! – entuziasmiĝis Aleksej Ivanoviĉ. – Tuj riparebla! Iru ni al la fajro.

Tamen la ŝaŝlikumado estis ĉifita. La kompanio eltrinkis po du glasetojn, postmanĝante per kukumoj kaj fumantaj ŝaŝlikoj, la francoj iom vigliĝis kaj ĝentile eligis ravitajn frazojn, sed tio ne savis la situacion. La vesto de la gastoj ne permesis longan restadon en la frosta aero, ankaŭ Seniĉkin, kiu lasis sian ĉapon en kajuto, jam frostis malgraŭ ŝtele fortrinkita glaseto. Li mansvingis invite al la francoj, kaj la tuta alveninta kvinopo retiriĝis en la tranĉeon, kurante al la buseto. Maksim kolektis restintan manĝaĵon kaj manĝilaron en sakon kaj faldis la tableton. Aleksej Ivanoviĉ foriris sur glacion por preni kaptilojn. Lazar prenis la ŝovelilon kaj ĵetis en la siblantan fajrujon kelkajn plenŝovelilojn da neĝo. Farinte ĉion ĉi, ankaŭ la tri distrantoj sin direktis al la buseto.

– Rekte al SKE, – diris Maksim al Seniĉkin.

– Scias mi, ne stultiĝis dume, – Seniĉkin respondis tradenten.

La motoro restis funkcianta dum la tuta nelonga ŝaŝlikumado, do la buseto ekimpetis kvazaŭ juna stalono, iom balanciĝante sur la vintra arbara vojo. Post dudek minutoj ĝi haltis ĉe la enirpordo de SKE.

Sport-kuraca ejo, kurte nomata SKE, estis duetaĝa konstruaĵo, kiu iam servis kiel kontoro de la fabriko. Sed antaŭ sep jaroj, kiam "Rusoplast" estis transprenita de alia ministerio, tiu provizis la fabrikon per monrimedoj por konstrui novan oficejon. Du jarojn poste la konstruado venis al fino, kaj oficista aro, ŝvelinta dum perestrojko ĝis kvardek tri etatanoj, gaje akaparis novajn kabinetojn. La malnova kontoro dum duonjaro restis neuzata; foje iu vica ministeria komisiono, veninta por

---

[1] Ĉu plastikaĵo? *(fr.)*

kutima duonjara kontrolo kaj drinkigata de Viĉjo Sigaev en nova direktora kabineto, laŭdis lin, sed aludis, ke estus bone se "Rusoplast" havu ion pli decan por akcepti gastojn. Eble saŭnon… eble kun ripozejo! Viĉjo entuziasme petis por tio nur iom da mono – ĉar jen la neuzata konstruaĵo – oni devas nur ripari iomete… Tiel la iama kontoro iĝis SKE, kies duan etaĝon okupis kelkaj kurackabinetoj kaj du ĉambroj por loĝigi gastojn de la fabriko, dum grandan aŭlon por kunvenoj en la unua etaĝo oni transformis al sportejo. Tie trovis lokon "svedaj muroj", kelkaj trejnaparatoj kaj granda vera bilardo – donaco de la ministerio. Apud la iama aŭlo estis du ĉambroj, kie atendis vican demonstracion aro da ruĝaj flagoj, sloganoj kaj portretoj de Politburoo-anoj. Ĉio ĉi lastatempe iĝis ne tro aktuala, do unu ĉambro – malpli granda – iĝis senvestiĝejo kaj samtempe trinkejo postsaŭnada, sufiĉa por ĉetabligi dekduopon; la duan, pli grandan ĉambron oni dividis je du. En la unua duonĉambro per klopodoj de Lazar, la ĉefelektristo, kaj Maksim, la ĉefmekanikisto, estis aranĝita perfekta saŭno por kvar personoj, kaj la dua iĝis duŝejo.

Nun la unua etaĝo de SKE akceptis ĉiujn venintojn, krom Seniĉkin, forsendita teumadi al la fabrikgardisto. Transfenestre rapide densiĝis krepusko, ekneĝis kaj sudorienta ventego fajfis, pelante neĝerojn preter lanterna fosto ĉe la enirpordo. Sed en la antaŭsaŭna ĉambro regis varmo kaj amikeco. Ĉiuj – kaj la gastoj kaj la mastroj – jam unu fojon vizitis saŭnon, varmigitan anticipe, kaj sidis ĉe plenplena manĝotablo (Irinjo, la sekretariino de Viĉjo, prizorgis matene) preskaŭ senveste. La viroj volvis lumbojn per grandaj vilaj tukoj, prenitaj en ŝranketo; la spertaj peterburganinoj, antaŭvidintaj similan distron, venis kun duobjektaj bankostumoj. Estis diritaj jam tri tostoj – ili levis la glasojn je la mirinda rusa vintro, je la sano de ĉiuj ĉeestantoj kaj je la ĉarmulinoj, kiuj faras la vivon preskaŭ perfekta. Aleksej Ivanoviĉ sentoste forkonsumis pliajn tri glasetojn kaj provis klarigi al la francoj sendubajn avantaĝojn de soveta sistemo kaj same sendubajn mankojn de la nuna.

– Mi al vi en la rusa, pura rusa lingvo diras! – li krietis, tirante per ambaŭ manoj vilan grizan hararon sur sia brusto kaj fiksrigardante jen al Dominik, jen al Kristian. – Mi estis la ĉefa persono en "Rusoplast!" Demandu min, kio estas mia ofico!? Nu, demandu! Mi estas estro de la proviza fako, kaj dum soveta tempo nur mi kapablis trovi ĉion-ĉion necesan! La fabriko funkciis! Kie mi trovis plastojn? Lagrojn? Acetonon?!! Neniu kapablis, sed mi – ja jes! Sed nun? Kio okazas nun? Ĉio estas, ĉion oni povas mendi libere... Nur mono mankas, ĉar neniu bezonas niajn prifekitajn kombilojn kaj sapujojn! Do kio mi estas nun, kio estas nun Aleksej Ivanoviĉ Kvadratov, kiun ĉiuj estimis nur antaŭ du jaroj? Kio? Nulo! Nuleto mi estas!..

La francoj imitis atenton kaj interesiĝon, sed foj-de-foje helpopete rigardis al Maksim. Ljuda puŝis lin per kubuto kaj elokvente montris per rigardo, ke endas ŝtopi jam la "nuleton". Maksim prenis gitaron.

– Ĉu ni kantu iomete, knabinjoj? – li diris emocie. – Por niaj gastoj – *pour vous, chers amis!*[1]– kaj li komencis per sia simpatia baritono:

Chevaliers de la table ronde

---

[1] Por vi, karaj amikoj! *(fr.)*

Goute le vin si le vin est bon.[1]

Ambaŭ francoj aliĝis entuziasme, gaje svingante la glasojn – do eksvingis ĉiuj, ekbalanciĝis dekstren-liven, kaj por du-tri minutoj sincera komuna ekĝojo ekregis la kompanion:

Il est bon, il est agreable
Je boirai jusqu'a mon plaisir.[2]

La knabinjoj ekmurmuris ion; evidente ili ne konis la kanton. Aleksej Ivanoviĉ, svinganta la glason ĵus plenigitan, dum pli vasta svingo elverŝis duonon kaj la reston rapide englutis.

– Rusan, rusan donu, Maksimĉjo! – li ekblekis. – Siajn francajn ili hejme kantu!

Kristian kaj Dominik ĉesis balanciĝi kaj demande ekrigardis al Maksim. Tiu ne embarasiĝis – post tuseto li ekpinĉis la kordojn laŭvice.

– Do, knabinjoj, tion vi certe scias! Dancetu por viaj knaboj!

– Je-es! – ekjelpetis Ljuda. – "Ciganoĉka"! Ni volas!

Du gitaroj sur la mur'
Ekĝemetis plende…

Maksim komencis lante, nehaste, poiomete rapidigante la ritmon pli kaj pli. Ljuda kaj Nataŝa same malrapide, movetante la koksojn, eliris de ĉe la tablo sur liberan placeton kaj ekdancis arde, invitante siajn francojn per elokventaj mangestoj. Kristian aliĝis la unua, lin sekvis Dominik – ili ektrotis apud la knabinjoj, kompensante la mallertecon per bravaj ekjelpoj kaj kontentaj ridetoj. Estis ja kaŭzo por kontento: la knabinjoj preskaŭ senvestaj aspektis emocie. Ili signalis alvoke per la okuloj, imitante ciganinojn svingis la mamojn, lerte turnadis la pugojn, gaje ridetis, ŝajnigante, kvazaŭ ĉion ĉi ili faras nur por propra ĝuo kaj plezuro. Nataŝa proksimiĝis al Lazar, prenis lian manon, tirante en la dancrondon. Lazar peze detabliĝis, plifirmigis nodon de viŝtuko surlumbe kaj ekdancis kontraŭ Nataŝa kun eksteratenda lerteco, kvazaŭ vera cigano, jen eksidante, tuj saltante, elĵetante la krurojn diversflanken kaj fojfoje arde svingante siajn krispajn nigrajn harojn. Li estis je duonkapo pli alta ol nemalalta Kristian; reliefmuskola, montranta en ĉiu movo imponan viran forton. Nun ili dancis nur duope – ceteraj dancintoj staris ĉemure kaj aplaŭde akompanis la paron. Aleksej Ivanoviĉ, aplaŭdinta ĉetable, sukcesis eltrinki plian glaseton, kaptis per forko peceton da stufitaĵo, sed ne sukcesis meti la viandon en la buŝon. Liaj okuloj fermiĝis, kaj, duonfalinte al la muro, li ekdormis kun forko enmane. Maksim ludis kaj kantis plu, montrante, ke nenio grava okazis. Ljuda denove eniĝis la dancon, tirante ambaŭ manojn de Dominik, sed subite, pro la nefirma nodo, la viŝtuko, volvanta lian subon, falis surplanken. La knabinjoj ekjelpis, poste ekridis, aliĝante al la ridego de la viroj.

Dominik, pardonpete ridetanta, levis kaj revolvis la viŝtukon.

– Altabliĝu! – invitis Maksim. – Trinku ni je nia amikeco!

Ĉiuj, krom dormanta Aleksej Ivanoviĉ, levis la glasojn, tintigis ilin kaj eltrinkis.

---

1 Kavaliroj de la ronda tablo, gustumu la vinon, se la vino estas bona. *(fr.)*
2 Ĝi estas bona, ĝi estas agrabla, mi trinku ĝis mia plezuriĝo. *(fr.)*

– *Dis-moi, Lazar,* – diris Dominik, maĉante peklitan fungon. – *On dit, que les juifs ont ses ... ses outils, comprenez-vous, plus fort apres le cisaillement… C'est-ca?*[1] – Li montris perokule sian viŝtukon surlumbe.

– Traduku do! – Lazar rimarkis ekrideton de la knabinjoj kaj sin turnis al Maksim.

Nataŝa leviĝis kaj pigramove direktis sin en la saŭnon. Maksim tradukis. Lazar sovaĝe rigardis al Dominik kaj eligis kurtan ekridon:

– Ĥa-aĥ! Diru al li, ke mi ne estis cirkumcidita, ĉar miaj gepatroj estas komunistoj. Sed mian forton tio neniel malpliigis, ĉi-rilate ili ne havu dubojn.

Li malrapide leviĝis kaj foriris en la saŭnon, sekvante Nataŝan. Maksim tradukis, ŝaltante elektran samovaron, kaj petis helpon de Ljuda por iomete liberigi la tablon kaj prepari ĉion por teumado. Aleksej Ivanoviĉ plu dormis kviete kun forko en la mano. Dominik kaj Kristian gaje ridegis, pridiskutante la respondon de Lazar, sed Maksim konjektis, ke Kristian iom maltrankvile rigardas al la saŭna pordo, kaj ke nur ĝentileco malhelpas lin tuj kuri tien.

La saŭnon plenigis varmego kaj specifa bonodoro de tremolaj latoj, kovrantaj la murojn. Nataŝa jam ŝvitis sur la supra breto kaj kun rideto observis enirantan Lazar. Tiu ekridetis responde kaj demandis:

– Ĉu mi aldonu iom da vaporo, ha?

– Eble jes… – respondis Nataŝa.

Per antaŭpreparita herba infuzaĵo Lazar duonplenigis ĉerpileton kun longa ligna tenilo kaj jetis la infuzaĵon sur inkandeskajn ŝtonojn. Sekvis siblego, kaj la ejon plenigis blanka vaporkrepusko. Lazar ĵetis ankoraŭfoje.

– Uĥ! – Nataŝa diris, haste descendante sur malsupran breton. – Tro da varmego. Tamen, Lazar… ĉu estas vero?..

– Kia vero? – Lazar sidiĝis apude.

– Pri la forto…

– Nu, jes, estas vero.

– Montru, mi petas… por momento.

Lazar ĵetis al ŝi rektan atentan rigardon kaj malvolvis la tukon. Nataŝa mordetis lipon kaj etendis la manon por tuŝi, sed tuj haste retiriĝis.

– Hej, kiel stalono ekprancas! – ŝi diris kun rava ektimo.

– Ĉu ne estas via vesto superflua por tiu varmego? – diris Lazar. – Deprenu.

– Ne, karulĉjo! – Nataŝa ekridis. – Mi supozas, ke Kristian tuj venos tien ĉi, kaj tio al li ne plaĉos.

– Ĉu gravas? – Lazar ŝajnigis naivon.

– Do. Mi ne deprenu. Ĉar mi multon ankoraŭ esperas depreni de li...

Lazar volvis la tukon, faris nodon kaj denove prenis la ĉerpileton. La pordo ovriĝis kaj sursojle aperis Kristian kun freneza rigardo. Nataŝa, jam sidanta sur la supra breto, diris etendovoĉe:

– *Christia-an, viens chez moi...*[2]

---

[1] Diru, Lazar, – onidire, la viriloj de la judoj iĝas pli fortaj pro cirkumcido, ĉu ne? *(fr.)*

[2] Kristian, venu al mi… *(fr.)*

– *Il fait chaud!* – eksklamaciis Kristian, trankviliĝante. – *Trop chaud!*[1]

– *Oh,oui!*[2] – eĥis Nataŝa desupre, leviĝanta en la vapornebulo. – Terura varmego! Ne falu, knaboj!

La lastaj frazoj en la rusa estis adresitaj, ĉefe, al Lazar. Nataŝa ambaŭmane deprenis la mamzonon trans la kapon kaj ridetante ordigis hararon.

– Oh, oh!..– Kristian elspiris embarasite.

Lazar turnis sin kaj iris for el la saŭno.

Al la teumado Aleksej Ivanoviĉ sukcesis vekiĝi. Maksim ŝovis al li tason da varmega forta teo. Aleksej Ivanoviĉ klinis sin kaj komencis sorbi etglute, pro tremantaj manoj ne levante la tason, blovante en ĝin antaŭ ĉiu eksorbo. Lazar morne trinkis apud Maksim. Nataŝa tenis sian tason per la dekstra mano, karesante per la maldekstra la bruston de Kristian kaj ion flustrante en lian orelon. Dominik kun Ljuda ankaŭ sidis brakume, ĉe tio Ljuda ŝovis en lian buŝon vakcinian konfitaĵon – kuleron post kulero. Dominik ŝmacetis, duonfermis la okulojn kaj fojfoje glutetis teon post la dolĉaĵo. Poste li rompis la silenton enĉambre:

– *Maxim, explique-moi, s'il te plait,* – li diris. – *Monsieur Eltsin a declare ses intentions que tous les fabriques soit privees. J'espere, que "Rusoplast" aussi. Donc, qui sera le possesseur de la fabrique?*[3]

– Kion li demandas pri nia "Rusoplast"? – Aleksej Ivanoviĉ elbalbutis minace. – Ne perfidu niajn sekretojn, Maksim, ŝtopu lin!

– Ne gravas, trankviliĝu, – Maksim diris al li, poste sin turnis al Dominik. – *Je ne sais pas… Aucun sait maintenant… Je crois, que je ne serai pas,*[4] – li finis kun rido.

– *Mais, pourquoi pas?*[5] – demandis Dominik.

Maksim movetis la ŝultrojn kaj iris telefoni al Seniĉkin, ke li preparu la buseton.

Estis ĉirkaŭ la dekunua. Seniĉkin, kolera kaj silenta, hastis en la urbocentron, direktante la kompatindan buseton jen dekstren jen malen por eviti vojkavojn. La vojo estis nelumigita, sentrafika, do nur la reflektoroj de la buseto lumigis eble dudek metrojn antaŭ ĝi. Aleksej Ivanoviĉ kviete dormis malantaŭe, Lazar sidis apud li, ankaŭ ŝajnigante sin dormanta. La francoj kaj la knabinjoj okupis la antaŭajn kvar sidlokojn kaj timeme rigardis antaŭen; la knabinjoj solidare eligis jelpeton ĉe ĉiu abrupta flankenĵeto de Seniĉkin. Maksim sidis apud li indiferente, ĉar al kelkaj avertoj kaj admonoj Seniĉkin elorgojlis, ke ankaŭ li havas familion, kiu atendas hejme.

Subite la francoj ektumultis.

– *Maxim, Maxim, regardez!*[6] – ekblekis Dominik.

---

[1] Estas varmego! Troa varmego! *(fr.)*

[2] Ho, jes! *(fr.)*

[3] Maksim, bonvolu klarigi al mi. Sinjoro Jelcin deklaris sian intencon privatigi ĉiujn fabrikojn. Espereble, ankaŭ "Rusoplast". Do, kiu estos la posedanto de la fabriko? *(fr.)*

[4] Mi ne scias… Neniu scias nun… Mi kredas, ke ne mi! *(fr.)*

[5] Sed kial ne? *(fr.)*

[6] Maksim, rigardu! *(fr.)*

– *Maxim, un arbre!*[1] – ankaŭ Kristian ekkriis hororiĝinte.

Efektive, je kelkdek metroj antaŭ la buseto en lumo de la reflektoroj aperis dika sesmetra trabo, verŝajne falinta de sur iu lignotransportilo. La trabo estis kuŝanta diagonale, preskaŭ barante la vojon.

– Seniĉkin, – Maksim diris. – Haltu, endas formovi la trabon.

– Ne gravas, – rikanis Seniĉkin, ne reduktante la rapidecon. – Ni sukcesos.

Ljuda kaj Nataŝa fermis la okulojn, iliaj kavaliroj plu rigardis en stuporo. La buseto, ĵetita liven, kaptis flankvojan neĝon per la maldekstra antaŭa rado, por momento ekkonvulsiis, sed sukcesis retrovi ekvilibron. La trabo restis malantaŭe.

– *Mais, les autres voitures?..*[2] – diris Dominik.

Maksim movetis la ŝultrojn.

En REGo № 6/2006 estis publikigitaj "Amuzaj misskriboj kaj eraroj". Mi delonge gvidas korespondajn kursojn de Esperanto kaj ankaŭ povas proponi por publikigo diversajn ridindajn mistradukojn. ***Marija Prilepskaja (Samara)***

Булка – panino.
Я нашел – mi suriris.
Preterpasanto – мимо прохожего.
Anstataŭanto – вместитель.
Fingringo – ладонь.
Loĝantaro – многоквартирный дом.
Senreviĝi – отмечтаться.
Malgraŭ la kapdoloro – несмотря на доллар.
Per unu vorto – первым слева.
Super nulo – нуль сверху.
Mi akompanos vin iomete. – Я должен написать сонет вам.
Ĉu vi havas la ŝatatan manĝaĵon? – Вы любуетесь едой?
Ĉiu patrino amas sian idon. – Каждая мать любит свою идею.
Mi konas ilin ambaŭ laŭ vizaĝo. – Я знаю их обоих по визиту.
Ĉu demando estas malfacila? – Отчего тяжело в мире?
Mi longe staris antaŭ ĉi tiu bildo. – Я долго стоял перед этим прекраснейшим зданием.
Ĉio estas vidinda, sed ne ĉio estas sekvinda. – Все телятина, но не все сухое мясо.
Li havas la temperamenton de sudano. – У него характер судьи.
La adiaŭa lignofajro bruladis ĝismatene. – Прощальный пожар горел до утра.
La kulturpalaco "Samtempulo" estas vizitata de junularo. – Дворец культуры "В то же самое время" посещается молодежью.
Dum unu semajno fervora kolegaro ĝuis la renkontiĝon kaj kompreniĝon. – В течение недели ревностное общество наслаждалось встречей и сделалось понятливым.

---

[1] Maksim, estas arbo! *(fr.)*
[2] Sed kion pri aliaj aŭtoj? *(fr.)*